


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 583 (6)

JUNIO 1954



La Zeiss-Planetaria Aparato. *Vidu paĝon 177*

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅛ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Enhavo

Specialaj Artikoloj :	paĝo
La Estraro de U.E.A. : <i>La Prezidanto</i>	161
Ekspozicio en Montevideo ; Publika Letero al Amiko	166
Renkontoj : <i>F-ino Dr. J. W. Herfst</i>	172
Pula : <i>St. V. Stojnić</i>	175
La Planetario, speciala astra teatro : <i>Josef Steppan</i>	177
La Unua Verkisto de Malgranda Popolo : <i>Paŭlo Balkányi</i>	180
La Tombejo de la Nekatolikoj en Romo : <i>Luigi Minnaja</i>	181
La Fundamentoj de Asekuro : <i>E. Motillon</i>	185
Nova Metodo por Fruktkulturado : <i>Gudrun Johnson</i>	187
39a Universala Kongreso :	
Oficiala Komunikado n-ro 8	168
Belartaj Konkursoj de UEA :	
1953 (Prozo originala) La Sorĉisto : <i>Stepan Urban</i>	169
(Poezio tradukita) Admono al Junulinoj : <i>John S. Dinwoodie</i>	171
Poezio :	
Vana Sapiro : <i>Eli Urbanová</i>	190
Konstantaj rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado	165
Enigma Konkurso	184
Internacia Konkurso	190
Nia Forumo	173
Niaj Mortintoj	188
Oficiala Informilo	191
Radio kaj Esperanto	176
Tra la Mondo Esperantista	163

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 583

Junio 1954



La Estraro de U.E.A.

BRILANTA suno, trilantaj turdoj kaj florantaj ĉerizarboj estis la kadro, kiam la Estraro kunsidis dum la pasko en la UEA-domo en Heronsgate.

La printempa optimismo ankaŭ stampis la diskutojn kaj la decidojn de la Estraro, sur kies tagordo estis pli ol 50 eroj. El tiuj proksimume unu triono traktis pure internajn aferojn: la administradon, la financojn kaj la raportojn de la estraranoj, ĉiu pri sia fako. Alia triono estis dediĉita al prilaboro de la statuto kaj la regularoj de U.E.A. por konformigi ilin al la akiritaj spertoj kaj al la novaj bezonoj. La lasta triono enhavis i.a. la gravajn demandojn pri la agado de CED, la ampleksan studon pri la kunlaboro kun Unesko kaj la Universalajn Kongresojn.

La raportoj de la estraranoj montris bonan progreson de la asocio, ankaŭ rilate al metoda kaj laŭplana agado. Raportis: *la Prezidanto de UEA* pri ĝeneralaj aferoj kaj kongresoj, koordinacio de la laboroj de la aliaj estraranoj; *la Vicprezidanto, D. Kennedy*, pri la landaj asocioj kaj la lokaj grupoj; *J. Guillaume* pri kulturaj problemoj; *Hans Jakob* pri Serva Centro kaj la revuo; *D-ro Kempeneers* pri aferoj rilatantaj fakajn asociojn; *D-ro Lapenna* pri CED kaj

pri eksteraj rilatoj kaj informado; *A. Oliver* pri administrado kaj financoj.

La aktiveco de UEA ankaŭ respeguliĝis en la kresko de la membraro, laŭ la raporto de la *Ĝenerala Sekretario*. Fine oni konstatis, ke la ekonomia stato plifortiĝis, kvankam estos necese ankoraŭ pligrandigi la membrastokon por havi ekvilibron inter la enspezoj kaj elspezoj. Kelkaj el la fondaĵoj de UEA ricevis malavaraĵajn donacojn, kio sekurigas fortikan bazon por bona aktiveco en la estonteco: Propaganda Fondaĵo nun estas £130, Fondaĵo H. Hodler £1.250, Garantia Fondaĵo UEA £1.000 kaj Fondaĵo Montevideo £800. Aparte ĝojiga estas la ĝenerala oferemo por la Fondaĵo Montevideo, kiu celas ebligi al la Esperanto-movado indan reprezentadon ĉe la venontaŭtuna konferenco de Unesko kaj ankaŭ aranĝon de impona unua Universala Esperanto-Ekspozicio en Montevideo. La Estraro fieras pro la solidareco, kiun la tutmonda esperantistaro montris (kaj *montros*, ĉar ankoraŭ estas tempo por donacoj!) por tiu grava afero. Kiel reprezentantojn, observantojn ĉe la Konferenco ni elektis prof. Lapenna kaj prof. Fernández Menéndez.

Dum la kunsidoj—kiel cetere dum la tuta jaro—la Estraro diskutis

diversajn ŝanĝproponojn de la Statuto, kaj nun fiksas projekton, kiun la Komitato en Haarlem kaj poste la Landaj Asocioj devos ekzameni.

La Estraro ankaŭ decidis, tamen ne unuanime, lokigi la Centran Oficejon en la urbon Londono, kaj tiucele aĉeti domo tie, post vendo de la nuna domo en Heronsgate, kiu situas iom ekster la urbo.

Laŭ la raporto de la *Konstanta Kongresa Sekretario* montriĝis, ke por la unua fojo en nia historio la Universala Kongreso en Haarlem jam akceptis tiom da kongresanoj, 2.300, ke plua akcepto ne estas ebla pro la manko de lokoj en la salonoj. La Estraro antaŭvidas brilan kongreson, en kies programo estos i.a. ankaŭ teatraĵo ludota de profesiaj aktoroj. La venontjara kongreso okazos en Bologna, Italujo.

En la tagordo troviĝis efektive tre multaj interesaj punktoj. Mi nur volas menci, ke la Estraro decidis aranĝi popularan konkurson inter la esperantistoj pri la plej bonaj libroj aperintaj post la milito. Estos ankaŭ romankonkurso por Esperanto-verkistoj. Por havi eblecon konkeri la sportistaron por la Internacia Lingvo la Estraro decidis prilabori fakterminaron pri Sporto. La unuan ĉapitron, pri futbalo, prizorgos S-ro Rapley, nia oficisto en C.O. La Estraro ankaŭ decidis subteni la Armean Terminaron, kiun prilaboras Generalo Bastien, Kolonelo Léger kaj Kapitano Agourtine.

Dum la kunsidoj, kiuj daŭris 3 sinsekvajn tagojn de la mateno ĝis la malfrua vespero, oni sentis la dinamisman evoluon de nia asocio. Kaj je la fino de la kunsidoj estis al mi emocie kara danki ne nur al la estraranoj, sed ankaŭ al la oficistoj de UEA kaj al ĉiuj gvidantoj kaj

kunbatalantoj, kiuj ĉie en la mondo subtenas nian grandiozan ideon per entuziasma aktiveco.

E. Malmgren,
Prezidanto de U.E.A.

Esprimu vian simpatian al nia Prezidanto

Sinjoro E. Malmgren, la Prezidanto de UEA, tre ŝatata kaj alte estimata en la tuta Esperanto-mondo, ĵus submetiĝis al nova grava operacio. Post la operacio li devos kuŝi tute senmova en la hospitalo dum proksimume 8 semajnoj. Antaŭ ol eniri la hospitalon, s-ro Malmgren skribis en unu el siaj leteroj: "Kio estas la plej ĝena dum la restado en hospitalo, estas, ke oni sentas sin ekster la floranta vivo..."

La subskribinto iom pensis kiamaniere helpi al nia Prezidanto elteni pli facile tiujn longajn 8 semajnojn, plezurigi lin persone, sed tamen ne ĝeni lin per longaj skribaĵoj. Sciante, ke li kun granda amo okupiĝas pri pentroarto kaj desegnado, mi sugestis, ke el ĉiuj landoj oni sendu al li kiel saluton kaj kuraĝigilon iun desegnaĵon aŭ akvarelon, faritan de infano aŭ de plenkreskulo. Oni sendu tion al adreso: E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm S.V., Svedujo. Faru tion jam hodiaŭ!

I.L.

ESPERANTO

Tole-binditaj volumoj

- | | |
|------|---|
| 1951 | Al MA de tiu jaro 5ŝ 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p. |
| 1952 | Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p. |
| 1953 | Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p. |

Mendu ĉe U.E.A.



Tra la Mondo Esperantista



Ĉeĥoslovakujo

Kelkaj kluboj vige funkcias. Interalie, ni ricevis la programon por Majo-Aŭgusto de la Esperantista Rondeto en Brno. Elstaraj personoj parolas ĉe ĉiusemajnaj kunvenoj, kaj evidentiĝas, ke la klubo havas mirinde altan kulturan nivelon.

Finnlando

Dum la Pasko okazis en Helsinki tutlanda kongreso de Suomiaj Esperanto-societoj: Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF), Finnlanda Laborista Esperanto-Asocio (FLEA) kaj la societoj por Esperantistaj Instruistoj, Fervojistoj kaj Kristanoj. Partoprenis ĉ. 150 samideanoj.

Ĉeestis kiel gasto reprezentanto de la Centra Ligo de Suomiaj Sindikatoj, kiu en sia varma salutparolado donis ĉiun subtenon al nia afero. Li bedaŭris, ke li ne ĉifoje kapablas saluti en Esperanto, sed promesis, ke tio okazos en la sekvonta kongreso.

EAF elektis kiel prezidanton por la kuranta jaro redaktoron Y. Kuorikoski, kaj decidis peti aliĝon al UEA kiel Membro-Asocio. Oni instruas la Internacian Lingvon en lernejoj ĉe ok gravaj lokoj en la lando. Pro plej aktiva laboro dum la jaro (nome en la fervojista medio) ricevis premion Sinjoro Antti Ruhanainen.

La semajna instruista gazeto *Opettajen Lehti* jam du monatojn regule dediĉas duonpaĝon al Esperanto. Instruistoj en ĉiuj landoj

bonvolu sendi gratulsalutojn al la gazeto, kies adreso estas Bulevardi 28, Helsinki.

La kongreso estis bonege organizita kaj havis tre riĉan programon. Evidentiĝas, ke nun oni tre energie laboras por la lingvo en Finnlando.

Germanujo

La prezidanto de la regiona tribunalo en Munkeno I publike enoficigis Doktoron Siegfried Ziegler kiel interpretiston por Esperanto kun la titolo "oficiale enoficigita kaj priĵurita interpretisto por Esperanto". Li estas rajtigita uzi specialan stampilon. La oficialigo signifas gravan agnoskon de Esperanto per altranga germana instanco.

Nederlando

Nia membro-samideano J. A. van Huizem veturigis la vagonaron de la danaj Gereĝoj al Amsterdam okaze de ilia oficiala vizito al Nederlando. Pro tio li nome de la Reĝo ricevis la reĝan rekompencomedalon unuaklasan.

Norvegujo

La jarraporto de NEL montras konsiderindan progreson. Kursoj de diversaj specoj allogis plurajn centojn da lernantoj, kaj la Ligo nun bezonas nur kelkdekon da membroj por baldaŭ transpasi la mil-limon. Tre aktivis la Gazetara Servo nacia, kiu sukcesis aperigi 668 menciojn pri la Internacia Lingvo en 124 gazetoj.

Svedujo

Kunvenis en Februaro 16 knaboj 13- ĝis 17-jaraj en Tuna-Hästberg laŭ invito de la Kristanaj Esperantistoj. Temis pri Ferio-Semajno kun Esperanto-lecionoj dufoje ĉiutage. Krome okazis publikaj varbokunvenoj en proksimaj lokoj kun ekspozicioj de literaturo kaj gazetaro, kaj prelegoj de S-ino Alamo-Sandgren, komisiita informistino pri Esperanto de la regna studasociaro. La sukceso kaj entuziasmo certigis ripeton de la aranĝo en venontaj jaroj.

TEJO-Kongreso

La deka TEJO-Kongreso okazos en Hilversum dum la semajno antaŭ la Universala Kongreso. En la Rekomenda Komitato estas D-ro W. Drees, Ministro-Prezidanto de Nederlando, Prof. M. J. Sirks, Direktoro de Genetika Instituto en Groningen kaj aliaj konatoj. Kun la Organiza Komitato kunlaboras la Komunuma estraro de Hilversum, la Unuiĝo por Fremdultrafiko kaj la Nederlanda Ruĝa Kruco. La Hilversumaj Sporthaloj disponigis grandan salonon por kunvenoj kaj festvesperoj. Je sabato la 24a de Julio okazos akcepto de la urba estraro en la Civitana Salono de la Hilversuma Urbdomo.

Ĉiuj junuloj estas invitataj. La kostoj estas *tre* malaltaj: por la tuta semajno, programo, ekskursoj, restado kaj manĝado en la kongresejo: por TEJO-membroj, f. 55.-; por ne-membroj, f. 60.-.

Tutmonda Konkurso

La Esperanto-Asocio de Nov-Jerzio donos premion de 25 usonaj dolaroj al gajninto en tutmonda konkurso pri skribita tezo "Kial la Unuigitaj Nacioj bezonas Esperanton". La

premion gajnos tiu, kiu skribos la plej bonan leteron pri la supra temo. Leteroj devas esti ne pli longaj ol 500 vortoj, kaj devas esti ricevitaj en Usono antaŭ la 15a de Septembro 1954. Oni sendu la leterojn al Esperanto-Asocio de Nov-Jerzio, 448 South Orange Avenue, Newark 3, N.J., Usono.

KONKURSO

Elekto de la plej bonaj Esperantaj libroj

Por havigi al la tutmonda esperantistaro la opinion de la legantaro pri la nuna esperanto-literaturo, la Estraro de UEA decidis starigi konkurson laŭ la jena regularo:

1. Rajtas partopreni ĉiuj individuaj membroj de UEA.


2. Ili **sur poŝtkarto** listigu la titolojn de la kvin plej bonaj Esperantaj libroj, eldonitaj post 1945, kiujn ili legis; ili enskribu sub n-ro 1, tiun kiu plej plaĉis al ili, kaj tiel sinsekve ĝis n-ro 5. Ili aldonu nomon kaj kompletan adreson, **sed nenion alian**.

3. La voĉdoniloj alvenu en la Centran Oficejon de UEA (Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo) ĝis la fino de oktobro 1954.

4. Laŭ tiuj voĉdoniloj la C.O. starigos idealan liston, konforme al la opinioj de la partoprenintoj.

5. Tiu, kiu ensendos liston plej proksiman al la ideala listo ricevos libro-premion (laŭ propra elekto) je valoro £1; la du sekvantaj ricevos libro-premion po 15 ŝilingoj kaj 10 ŝilingoj.

**FIERU PRI LA STELO
PORTU ĜIN**



Centro de Esploro kaj Dokumentado
300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Grava Verko pri la Internacia Lingvo

Post plurmonata intensa laboro CED en Julio publikigos verkon, en kiu estas prezentitaj ĉiuj plej gravaj atingajoj de Esperanto en ĝia 66-jara praktika funkciado. La verko havas 3 partojn.

En la unua parto, kiu havas la titolon "Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo", estas prezentita la formiĝo, ekesto kaj evoluo de Esperanto. Tiu ĉi parto enhavas ankaŭ diversajn opiniojn pri la valoro kaj signifo de Esperanto, informojn pri la instruado de la lingvo, prezenton de la Esperanta originala kaj traduka beletristika literaturo kaj de la scienca kaj faka literaturo en la Internacia Lingvo. Unu ĉapitro pritraktas la demandon de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto; alia prezentas la Esperanto-gazetaron kaj la lasta parolas pri la diversaj formoj de praktika aplikado de Esperanto, ekzemple en komerco, turismo, radio, PTT, prelegvojaĝoj, korespondado.

La dua parto de la verko prezentas la Esperanto-organizaĵojn, iliajn celojn kaj laboron.

La tria parto estas dediĉita al UEA. En ĝi estas mallonge prezentita la historio de UEA, ĝia nuna organiza formo, la kultura agado, la praktikaj servoj, la atingoj de UEA ĉe la Ligo de Nacioj kaj UNESKO, la universalaj kongresoj, diversaj internaciaj konferencoj, kursoj kaj renkontiĝoj.

La verko, kiu havas la titolon "La Internacia Lingvo—Faktoj pri Esperanto" estas redaktita de Prof. Ivo Lapenna kaj la ĉefaj kun-

laborantoj estis Mag. Reto Rossetti (literatura parto) kaj redaktoro Hans Jakob (historia parto). Antaŭparolon skribis la Prezidanto de UEA, E. Malmgren.

La libro havas 190 paĝojn. Ĝi estas presita sur luksa papero, tole bindita. La prezo de 10 ŝilingoj estas fiksita tiel, ke la vendo de la tuta eldono — 2000 ekzempleroj — kovru ĉiujn efektivajn elspezojn.

En la enkonduko al la verko, Prof. Lapenna skribas interalie:

"Publikigante tiun ĉi unuan sian verkon en formo de libro, CED varme deziras, ke la Esperantista publiko akceptu ĝin kun same tiom da amo, kun kiom da bona volo la kunlaborantoj kaj la redaktinto ĝin transdonas. CED, plue, esprimas la esperon, ke en la estonteco ĝi ricevos ankoraŭ pli fortan moralan apogon kaj ankoraŭ pli grandan financan helpon, tiel ke ĝi povos sen malfacilaĵoj plene disvolvi sian aktivecon por la realigo de ĉiuj celoj, por kiuj ĝi estas fondita kaj kiuj respondas al la esencaj taskoj de la Esperanto-Movado."

MALLONGAJ INFORMOJ

"Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio". La kunlaboranto de CED Marinko Gjivoje ĵus ellaboris tiun verketon. Ĝi estos presita kaj baldaŭ aperos. Interesiĝantoj turnu sin rekte al Marinko Gjivoje, Vodnikova ul. 19, Zagreb I (Jugoslavio).

Esperanto-fako en la Universitata Biblioteko en Zagreb. Dank' al klopodoj de la kunlaboranto de CED M. Gjivoje, la Universitata Biblioteko en Zagreb fondis apartan fakon pri la Internacia Lingvo. La Biblioteko jam posedas konsiderindan nombron da Esperantaj libroj kaj gazetoj. Por pli ampleksigi la fakon, la eldonistoj estas petataj sendi, se iel eble, po unu ekzemplero de originalaj kaj tradukaj verkoj en Esperanto al la adreso: Sveučilišna Biblioteka, Zagreb (Jugoslavio).

Financa helpo al CED. Ĉi-jare la kaso de CED ricevas malpli da donacoj ol en la pasintaj jaroj. Tio estas des pli bedaŭrinda, ĉar ĝuste en tiu ĉi jaro CED disvolvis la plej grandan aktivecon kaj bezonus plej fortan moralan kaj financon apogon de la tuta Esperantistaro. Ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj pli bonstataj esperantistoj estas petataj helpi per donacoj la agadon de CED kaj ebligi tiamaniere ĝian daŭran funkciadon.

ATENTIGO

Ek de la 1-a de Junio la Sekretariejo de CED kaj ĉiuj ĝiaj kunlaborantoj centrigos sian tutan aktivecon al la preparlaboroj por digne prezenti la aferon de la Internacia Lingvo al la

Ĝenerala Konferenco en Montevideo. Tial CED afable petas la Esperanto-organizaĵojn kaj la unuopajn esperantistojn *ne skribi al CED dum tiu preparperiodo pri kiu ajn alia demando*. Ĉiu displitiĝo de la fortoj en tiu ĉi decida periodo signifus seriozan danĝeron por nia afero en Montevideo.

DONACOJ AL CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 27-an de Februaro 1954	4	10	1
S-ro Crochet, Francujo ..		5	0
S-ro Lecoq, Francujo ..		10	0
S-ro Potier, Francujo ..		10	0
S-ro G. P. Turner, Usono ..		6	8
S-ro Broise, Francujo ..	2	10	0
S-ro Pauvrehomme, Francujo ..		10	0
Gen. Bastien, Francujo ..	1	0	0
D-ro H. Wehrheim, Germanujo		16	0
S-ro D. Williams, Anglujo ..		10	0
S-ro M. Fernández Menéndez, Urugvajo ..	1	0	0
Esperanto-Grupo Trondheim, Norvegujo ..	5	0	0
Svisa Esperanto-Societo ..	8	0	0
S-ro H. Kursteiner, Svislando ..	1	12	0
S-ro C. Nyanasatta, Cejlono ..	1	0	0
S-ro R. Harry, Aŭstralio ..	1	0	0
Stato la 5-an de Majo ..	28	19	9

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Britujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris X (Francujo), aŭ al CED mem.

Ekspozicio en Montevideo

Publika Letero al Amiko

KARA MARINKO,

Vi certe estos surprizita, kiam vi legos tiun ĉi respondon al via letero de la 14-a de Aprilo. Mi elektis ĝuste vin, ĉar vi estas ne nur mia samlandano, sed ankaŭ bona amiko, kaj al amiko oni povas pli facile diri multon, kion, pro la konata

sentemo de la homoj, oni ne povas diri al la aliaj. Mi skribas publike, ĉar tio, kion mi diros al vi, koncernas fakte ne nur vin, sed ankaŭ la aliajn, kiuj sendis ian materialon al Montevideo kaj ankoraŭ pli tiujn, kiuj ĝis nun sendis nenion.

En la nomo de la organizantoj de la ekspozicio mi, antaŭ ĉio, dankas al

vi pro la kolekto kaj sendo de la materialo. Ĉio, kion vi sendis, estas bona kaj certe utilos tie. Tamen tio, *kion vi ne sendis*, estas multe pli bona. Vi sendis plurajn gazetojn, kelkajn prospektojn, propagandajn flugfoliojn, nacilingvajn gazetojn kun Esperanto-rubrikoj. Sed vi ne sendis lernolibrojn, vortarojn kaj verkojn. Vi, ekzemple, sendis prospekton pri la libro “Jugoslavio kaj ĝia popoloj”, sed vi ne sendis la libron mem. Eĉ ne unu verko el la literaturoj de la jugoslaviaj popoloj, tradukitaj siatempe en Esperanto, estas senditaj al Montevideo. Kial vi ne sendis tien la Esperantajn tradukojn de la verkoj de Ŝenoa, Ogrizović, Tadijanović, Mazuranić, Ŝimunović k.a.? Ĉu vi vere opinias, ke ni povas organizi en Montevideo *universalan* ekspozicion de Esperanto, por dokumenti nian aferon ĉe la UNESKO-Konferenco, per flugfolioj, propagandiloj, glumarkoj, prospektoj kaj similaj negravaĵoj? Kompreneble, *ankaŭ tio* estas utila, sed nur ankaŭ! La ĉefa parto, la kerno de la ekspozicio devas esti *la Esperanta libro*.

Antaŭ mi troviĝas la listo de ĉio, kio ĝis nun estas sendita al Montevideo. Kelkaj—ekzemple la Norvega kaj Sveda landaj asocioj, la privataj entreprenoj kiel Heroldo de Esperanto, eldonejoj Ziegler, kaj Setälä, E.P.C.—fakte sendis multajn librojn. La aliaj agis plejparte kiel vi. Tio signifas, ke la ĝis nun sendita materialo al Montevideo neniel kontentigas. Tute speciale la ekspozicio devas enhavi multege da libroj, laŭ ebleco ĉiujn, kiuj ĝis nun aperis en la Internacia Lingvo.

Kiel mi diris plurfoje en cirkuleroj, en artikoloj kaj en privataj leteroj, ĉiu eldonejo devus sendi al Montevideo po unu ekzemplero de ĉiuj siaj

publikaĵoj. Plue, ĉiu landa asocio aŭ la komisiito de la landa asocio devus kolekti kaj sendi al Montevideo ĉion, kio aperis en Esperanto aŭ pri Esperanto en la koncerna lando. Nur tiamaniere la ekspozicio povos esti kompleta. Sekve, via tasko estas urĝe kolekti ĉiujn verkojn, publikigitajn en Jugoslavio. Vi nepre devas sendi ankaŭ ĉiujn lernolibrojn kaj vortarojn. Mi estas certa, ke, se vi serioze klopodos, vi certe sukcesos. Tiamaniere vi ne nur digne reprezentigos la Jugoslavian Esperanto-Movadon en Montevideo, sed ankaŭ kontribuos al la sukceso de la tuta ekspozicio. Do, kara Marinko, ne hezitu, sed tuj ekagu kaj sendu kompletan materialon kiom eble plej baldaŭ al **s-ro Rodolfo Garcia, Calle Yaguaron 1397, Montevideo, Urugvajo.**

Certe ĝojigos vin la informo, ke la Organiza Komitato de la ekspozicio intense aktivas, ke estas jam ellaboritaj grafikaĵoj pri diversaj aspektoj de la Esperanto-Movado, trovita tre konvena ejo, faritaj la skizoj de afiŝoj, flugfolioj kaj invitiloj. Ĉio en Montevideo funkcias perfekte. Ŝajnas ke la plej elstaraj landaj edukaj, sciencaj kaj kulturaj aŭtoritatoj formas specialan patronan komitaton. Ĉio ĉi montras, ke la ekspozicio facile povos esti rimarkinda sukceso, se nur la esperantistoj plenumos sian devon rilate la movadon kaj siajn proprajn idealojn.

Mi esperas, ke la supraj iom akraj vortoj ne ofendos vin. Ili, sendube, ne estas eldiritaj kun tiu celo, sed nur kun la deziro instigi vin—kaj ankaŭ la aliajn, kiuj legos tiujn ĉi liniojn—serioze helpi al plena sukceso de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto en Montevideo.

Kun tre koraj kaj amikaj salutoj,

Ivo.



39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion--7-a aŭguston 1954

N-ro 8

OFICIALA KOMUNIKO

Majon 1954

L.K.K. ne plu akceptas aliĝojn!

Adreso : Poŝtfako 140, Haarlem.

Banko : Rotterdamsche Bank, Haarlem.

Poŝtgirkonto : 604997.

Pagoj : Por ĉekoj el eksterlando L.K.K. devas pagi makleron al la nederlanda banko (kutime fl. 0.50 aŭ fl. 0.90 depende de tio, ĉu estas korespondado). Bonvolu aldoni tioman sumon al pagoj.

Nepre sendu la mendilon kaj pagon al la sama instanco, ekzemple al Peranto en via lando.

Loĝado : La mendoj por litoj alvenas relative malrapide. En junio la Loĝiga Servo malmendos ĉiujn litojn kiuj eventuale ĝis tiam ne estos rezervitaj kaj poste ne plu okupos sin pri loĝigado. La Loĝiga Servo meze de majo sendos al ĉiu mendinto avizilon kun la adreso de la loĝejo. Tiu avizilo estas ankaŭ legitimilo, kiun oni montru je alveno en la loĝejo.

Oficiala Programo : La programo de la kongreso jam estas aprobita de la Estraro de U.E.A. Tial L.K.K. ne plu povas konsideri petojn pri salonoj por kunvenoj aŭ proponojn por novaj eroj.

Kongresa Libro : Tiu libro kun plena programo, multaj informoj kaj listo de aliĝintoj estos preta en komenco de junio kaj L.K.K. tuj

sendos ĝin al ĉiu aliĝinto. En okazode nericevo bonvolu vin turni al L.K.K.

Statistiko (ĝis 30a de apr.) : Alĝerio 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 10, Belgujo 52, Brazilo 3, Britujo 277, Danujo 71, Finnuno 50, Francujo 236, Germanujo 260, Hispanujo 12, Indonezio 1, Irlando 5, Italujo 79, Japanujo 1, Jugoslavio 96, Kanado 4, Madejro 1, Maroko 1, Meksikio 2, Nederlando 614, Norvegujo 108, Novzelando 12, Portugalujo 7, Svedujo 271, Svislando 37, Turkujo 2, Usono 11. Sumo (el 28 landoj) 2226. (Multaj aliĝoj ankoraŭ ne estas listigitaj pro teknikaj kaŭzoj.)

*Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.*



... . Jes, sed ĉijare estos inundo nur de Esperantistoj

Belarta Konkurso 1953 : Prozo Originala

Stepan Urban

Kvina Premio

La Sorĉisto

POR ordigi la distritajn pensojn, hodiaŭ mi akceptis inviton de la longa, trankvila ulma aleo, kiu kondukas al malnova parko. Antaŭ jaroj la vojo estis tre frekventata, precipe dum dimanĉoj. Posttagmeze tie promenadis gepatroj kun siaj infanoj, vespere—junaj paroj, geamantoj. Nun la antikva parko ripozas. La junularon oni trovas sur ludejoj, ĉe la rivero kaj ĉirkaŭ dancorkestroj, geedzojn en kafejo, kinematografo kaj ĉie ajn . . .

La forlasitaj lokoj spiras melankolion kaj nur malofte en sia duondormo akceptas unuopan vizitanton. Iliaj iluzioj ne altiras modernajn homojn, kiuj ne komprenas la susuron de centjaraj arboj. Hodiaŭ oni deziras . . . nu, kion oni propre celas? Ĉu vere—barakti en bruego de la rapidanta tempo? Ĉu aŭskulti vortojn ĵetatajn en la venton . . . ?

Meditante mi paŝas la aleon; nenia animo estas videbla en vasta ĉirkaŭo, nur eta sciuro postrigardas min scivole. Subite aŭdiĝas voĉoj . . . , pluraj voĉoj, ie proksime! Post la arbustoj, jen ia movo; denove! Rido sonoras . . . jes, mi jam scias: la sorĉisto! La bone konata persono apud sia tableto. Jonglisto de mal-karaj iluzioj; ĉiam sin trovas homoj, kiuj deziras vidi liajn miraklojn . . . Sed—kial li tendas en forgesita parko . . . ? Apenaŭ tie ĉi oni trovas pli vastan publikon. Rigardu! Marinjo kun grandega maŝo kaj Joĉjo kun neevitebla skutilo . . . ! Nedubinde: ambaŭ troviĝas inter la publiko. Tiun amuzon mi nepre devas partopreni . . .

Karesinte sian pintan barbon, la sorĉisto ekparolas:

“Treege estimataj!

Hodiaŭ vispertos verajn miraklojn! Venu nur pli proksimen—treee estimataj—venu, vidu kaj miru! La granda prezentado—treee estimataj—okazos hodiaŭ escepte senpage por la maturaj, infanoj pagas la duonon! Veeenu, vidu kaj miru: hodiaŭ senpage! Facile kaj elegante, kun helpo de tiu ĉi bastoneto, mi nuligos leĝojn de la fiziko, atomistiko, numerologio, empirio, statistiko kaj aliaj sciencoj kaj artoj . . . *Arkanum Arkanorum* laŭ via deziro, tree estimataj!

“Ekzemple tiu ĉi skatolo: ĝi estas malplena, ĉu . . . ? Nun mi ĝin fermu kaj frapetu per la sorĉ-bastoneto . . . ! Jen, kio estas en la skatolo? Unu, du, tri—*Abra-kadabra*? ? ?”

Pŝŝŝ—el la skatolo elfugas tri blankaj kolomboj!

“Jeee” miras Marinjo, “ankoraŭ foje!”

“Kiel vi nomiĝas, estimata?” turnas sin la sorĉisto al la apude staranta knabeto.

“Nu, Joĉjo tamen!” respondas la fama kurbiciklisto indigne . . .

“Bonege! Estimata sinjoro Joĉjo, kion ci havas en la dekstra poŝo?”

“Ŝnureton!”

“Kaj kion ankoraŭ . . . ?”

“Kaŝtanon!”

“Vere . . . ? Montru ilin!” ordonas la sorĉisto, dume li jam lerte tiras el la knaba poŝo longajn buntajn paper-striojn, unu post la alia . . .

“Juuu!” ĝojsaltas Marinjo, “tiel belaj! Mi ŝatas ĉiujn kolorojn!”

La areto ridas kaj la magiisto revenas al sia tableto ĵetante komplimentojn. Poste li mangeste silentigas la publikon :

“Treee estimataj !

Ĝi estas nur eta provo por ekzemplo. Kio estas en via kofro, sinjoro?”, li turnas sin al alia ĉeestanto.

“Hmmm . . . butonoj. Kompren-eble, butonetoj ; ĉu vi bezonas ?”

“Dankon”, respondas la mago, “sed mi iomete dubas ; bonvolu ilin montri !”

“Jes, kial ne ?” La sinjoro palpas aperturon de la kofro. “Kompren-eble, butonoj, rigardu !” Sed tuj li fulmorapide resaltas. El lia kofro ekmarŝas solene en vico laŭ grandeco—dekdu grandaj elefantoj !!!

“Kie estas miaj butonetoj” la sinjoro rigardas embarasita la malplenan kofron. “Pri la elefantoj mi scias nenion . . . !”

“En via maniko, estimata sinjoro, ili estas : jen !”

Kaj en la sama momento pluvas en la kofron centoj kaj miloj da butonoj kaj butonetoj ! Butona inundo . . . ; la posedanto devas rapide saviĝi sur la plej proksima arbo antaŭ la terura lavango. La elefantoj dume malaperis ie en arbaro . . .

“Bona prezentado”, mi cerbumas ; “tian mi ankoraŭ ne vidis . . .” Ĉiuj tre bone amuziĝas, la feliĉa Marinjo kolektas paperstriojn kaj Joĉjo provas kapti kolombon . . . La arbaro muĝas kontente . . .

* * *

Post la paŭzo komencas la magiisto denove paroli :

“Treee estimataj,

Nun demandu mem ! Kiu deziras . . . ?” La areto embarasiĝas, unu rigardas la alian, neniu kuraĝas demandi. Nur Joĉjo kaj Marinjo frustras ion inter si . . .

“Hihihi . . . , jes ? Hihihi . . . !”

“Nu, kiu havas ian deziron, estimataj . . . ?” insistas la mago. “Kiu estos la unua . . . ? Mi solvos ĉion ; venu pli proksimen. Se mi ne trovos solvon de via enigmo, estimataj—mi fariĝu nulo ! Nulo, estimataj . . . ”

“Hihihi, nulo”, sonorile ridas Marinjo.

“Hihihi, nulo”, eĥsonas en la arbaro. Subite ekregas ia stranga silento, kiu fariĝas ĉiam pli kaj pli streĉa. Neniu pretas demandi . . . ; ĉiuj preskaŭ ĉesis spiri . . . Mi rimarkas la unuajn signojn de estiĝanta krepusko.

“Post tri minutoj ĉio nulo, estimataj ! Ĉu neniu havas ian deziron . . . ? La lasta okazo ; post tri minutoj . . . ”

La sorĉisto penetre rigardas unu post la alia ĉiujn ĉeestantojn, atendante reagon . . . Min frostas, mi volus jam iri hejmen . . . sed la ceteraj staras senmove. Ambaŭ infanoj fikse rigardas la pintbarbulon, kies okuloj pikas kaj pikas . . . Fine Marinjo interrompas la netolereblan silenton :

“Sinjoro sorĉisto . . . mi scias ion, kion vi certe ne kapablas”.

“Nu . . . ?”

“Svingi la orelojn, jen kiel Joĉjo !”

Ĉiuj rigardoj glitas al la knabo, kiu neimitinde lerte movas ambaŭ orelojn, grimacante kulpe . . . La okulbrovoj de la mago tiriĝas supren ; tion li ne atendis ! Li levas sian vergeton . . . sed estas evidente, ke li ne povas bridi la volon. Li luktas kun rido, kiu ĉiam pli komencas lin regi. Ambaŭ liaj buŝanguloj nereteneble disiĝas . . . , la sorĉisto komencas larĝe ridi . . . Ĉiuj ridetas, ridas,

fino sur paĝo 186

Belartaj Konkursoj 1953 :

Poezio Tradukita

Tradukis John S. Dinwoodie

3a premio

Admono al Junulinoj

Afablan “ne” rideta kun rigardo,
 mi volus, ke vi lernu, ĉar ĝi belas ;
 pri “jes”—se tion diras vi en ardo—
 domaĝe, ke vi tiel vin rivelas.
 Naŭzas nenio, kion vi oferas,
 kvankam ĝi devus esti kuraĝ-frukto ;
 sed plaĉas, se nur dece vi forpelas,
 kaj lasas cedi vin post ŝajna lukto,
 barakte, kvazaŭ kontraŭ la vol-forto,
 ŝajne kolera, tamen sen kolero,
 ĉar la posedon sekvas dezir-morto ;
 ne diras tion mi pro am-degelo.
 Kiel forĝist’ akveron post akvero
 sur fajron ŝutas, kaj ĝin plibriligas.
 Tiel deziron nutras la forpelo ;
 kuraĝon ne fridiĝi ĝi instigas.

Por karesiĝi, fuĝu la amaton ;
 frandaĵo estas kara, delikata ;
 neniam var’ abunda trafas ŝaton,
 do vin forturnu—kun orel’ malsata,
 kaj forrigardu—kun okulo gvata.
 Forfuĝas Amo, se vi ĉasas ĝin ;
 Sciu : se volas esti vi amata—
 fuĝu la Amon, kaj ĝi sekvos vin.

Alexander Montgomerie.

Radio Graz

La “Publika administracio por la aŭstruja radio” abrupte decidis ĉesigi la nun kvinjaran Esperanto-kurson ĉe Radio Graz, kiu laŭ la atesto de la sendilestraro estis unu el la plej ŝatataj partoj de ĝia daŭra programo. Esperantistoj en Aŭstrujo (Stirio) kompreneble ne konsentas kaj jam protestis ĉe la kompetentaj aŭtoritatoj. Sed por gravigi la proteston ni nun petas ĉiujn legantojn tuj skribi al: **Öffentliche Verwaltung f.d. Osterr. Rundfunkwesen, Wien XII, Singrienergasse** ; se eble laŭdi la kurson kaj peti ĝian daŭrigon per la ĝisnuna preleginto Prof. Adolf Hainschegg, kiu ja estas ankaŭ universitata lektoro de Esperanto kaj direktoro de la ŝtata Esperanto-ekzamenkomisiono en Graz.

Renkontoj

F-ino Dr. J. W. Herfst

(en *Het Remonstrantse Weekblad*)

NI rigardas kiel memkompreneble, ke en la trafiko ni atentunu kontraŭ la alia la regulojn ordinitajn, kaj ke ni zorgu ne bari la vojon unu al la alia.

Sed ke la trafika problemo havas ankoraŭ alian flankon, mi spertis kiam oni rakontis antaŭ nelonge en societo la jenan komikan okazintaĵon.

En intimeca urbeto, kiu pro la kreskanta trafiko iĝis tiom malkvieta ke oni devis delasi iom de ĝia intimeco, la polico ricevis la ordonon atenti, ke la piedirantoj laŭeble iru sur la dekstra flanko de la trotuaroj. La plimulto de la homoj obee iris sur la dekstran flankon, kiam policano patromaniera instigis ilin je tio. Sed maljuna sinjoreto neŝanceble iris kontraŭ la fluo.

Kiam policisto atentigis lin pri lia eraro, li diris: “Jes, policisto, vi ja povas ordoni ke ĉiu iru sur la dekstra flanko, sed vi ne scias kiom malagrabla estas, kiam oni neniam plu renkontas iun”. Post tio, laŭ la rakonto, la afabla policisto diris: “Nu, sinjoro, tiam vi nur restu iranta sur la maldekstra flanko”.

Mi ne scias, ĉu policano dirus ion tian, sed la rakonto evidente volas montri, ke tamen estas io akceptebla en la vidpunkto de tiu maljunulo. Estas nome vere, ke, se ĉio estus aranĝata kaj ordonata, intimeca interrilato inter homoj ne plu estas ebla. Se vere ĉiuj homoj precize konformiĝus al la ordonitaj reguloj kaj se ĉiu efektive nur atentus sian dekstran flankon de la vojo, tiam ni nur povus preterrapidi unu la alian, sen rigardi al ni en la vizaĝon, do ankaŭ sen saluti unu la alian.

Kaj en nia societo ni vigle estas irantaj en tiu direkto. Tiel kiel ni devas fari en la rapida trafiko por ne kaŭzi aŭ ekhavi akcidenton, ni bedaŭrinde ankaŭ ofte faras en la sociaj interrilatoj. Ni koleriĝas pri ĉiu, kiu mallerte aŭ ĝene baras al ni la vojon.

Ĉiam forte impresis min, ke la evangelioj rakontas, kiel Jesuo ofte havis prokraston survoje, irante al urĝa okazo aŭ grava celo. Plej karakterizaj estas la historioj de renkontoj dum Lia vojaĝo al Jeruzalem.

Li estis survoje al Jeruzalem, kie Li “devos multe suferi”, kiel Li mem anoncis. Ni havas la impreson, ke la disĉiploj ne tute komprenis tion, sed tamen estis profunde konvinkitaj pri la seriozeco de tiu vojaĝo. Kaj nun ie survoje la homoj kondukis infanojn al Li, por ke Li tuŝu ilin. La disĉiploj riproĉis ilin. Ili evidente opiniis nedece, ĝeni la Majstron. Sed Jesuo forte malaprobis tion kaj li diris: “Lasu la infanojn veni al mi, ne malhelpu ilin”. Kaj dum tiu sama vojaĝo Li renkontis blindulon, kiu sidis apud la vojo kaj laŭte petis kompaton.

Ankaŭ ĉi tie la sama sceno: la ĉeestantoj mallaŭdis lin, por ke li silentu. Sed Jesuo haltis kaj igis lin konduki al si kaj demandis, kion Li povos fari por li.

Por la dia amo renkonto neniam estas prokrasto. Por ĝi estas tempo kaj atento por ĉiu homo, granda aŭ malgranda. Kaj la interrompiĝoj, kiuj ekestas survoje, certe ree estos forigitaj.

fino sur paĝo 189



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Ne forgesu la evoluon !

En sia recenzo pri *La Bapto de Caro Vladimir* Jiří Sedlaček skribis : “Por atingi kelkfoje rimon, la tradukinto devis uzi novajn vortojn, sed pro tio li rajte povas alvoki la ‘poetan licencon’.” Por ke la legantoj ne tiru el la konstato de S-ro Sedlaček tro vastan konkludon, mi atentigas, ke en la tuta verko troviĝas (kun klarigo) nur kvin vortoj ne registritaj en la Plena Vortaro, dua eldono (1931) kaj el tiuj 5 nur 2 estas en rimloko. Efektive nenie D-ro Pumpr uzis tiujn vortojn pro la rimo, sed ĉiam nur pro neceso de ĝusta senco.

Ĉar nia sola norm-vortaro internacia (la Plena) eliris antaŭ 23 jaroj, estas nature, ke multaj vortoj intertempe alkreskis al la lingvo. Ĝis eliros la nova eldono de la Plena Vortaro kun la aktualiga suplemento, estas dezirinde, ke oni klarigu en libroj tiajn vortojn se oni ilin uzas. Sed ĉar la vivo marŝas kaj konstante trudas al la lingvo novajn bezonojn, tial ni trovas, ke hodiaŭ ankaŭ la Esperantaj gazetoj enhavas vortojn ekster la kadro de tiu vortaro el 1931. Ekzemple en la prozaj tekstoj de tiu sama kajero de *Esperanto* (la aprila) mi facila trovis 11 vortojn ne sidantajn en la Plena Vortaro. Similan rikolton oni povus fari ekzemple en *Heroldo de Esperanto*. Estus nerealisteme postuli de ofte aperanta gazeto, ke ĝi ĉiam glosu tiajn vortojn : pliparte oni

devas fidi, ke la ĉirkaŭteksto ilin klarigos, simile kiel en la nacilingvaj gazetoj kaj ĵurnaloj, kie oni ankaŭ uzadas novajn vortojn kaj terminojn. Kaj tute ne necesas alvoki poetan aŭ alian licencon por klarigi la aperon de tiaj vortoj. Parenteze, unu el la 11 “novaj” vortoj, kiujn mi trovis, estis tiu *licenco* uzita de S-ro Sedlaček !

Reto Rossetti, Anglujo.

Ĥ

Jam de kelke da jaroj oni rimarkas strangan fakton : la Esperantistoj ial ekemas anstataŭi la fonetike utilan literon *ĥ* en vortoj kiaj *meĥaniko*, *ĥemio*, *Ĥinujo*, k.a. Ĉu vere *ĥ* estas malfacila ? Ĝi ne ekzistas en la franca lingvo, sed mi renkontis multajn francojn, kiuj ĝin korekte prononcas. Memoru, ke sen ĝi oni ne povus diferencigi inter *ĥoro* kaj *koro*, *eĥo* kaj *eko*, *ĥolero* kaj *kolero*. Kial do ĝin fuŝe malaperigi el la lingvo, se ĝi estas samtempe necesa ?

Paul Ciliga, Francujo.

Pri scienca literaturo

En la decembra *Esperanto* Sinjoro T. J. Woodall respondis al mia letero pri sciencaj libroj kontraŭ amuzaj, eldonataj en nia lingvo.

Mi volonte konsentas ke, kiam ajn ekzistas sufiĉe da postulo por povigi la eldonon, sen financa malgajno, de libro pri iu ajn scienco, tiu libro estu eldonita. Eble mi en parto eraris.

Oni estas influata per kondiĉoj ĉirkaŭ si. El la kompare malmultaj Esperantistoj en Usono kaj Kanado oni sendanĝere povas diri, ke ne estas dudeko da kemiistoj, geologiistoj, abelbredistoj aŭ aliaj. El tiuj ĉi nombroj eldonisto estus bonŝanca se po du aĉetus libron. Sendube kondiĉoj multe malsamas alilande.

Mi do opinias ke oni eldonu tiom da sciencaj libroj kiom aĉetos scienculoj, sed ne oferu, kiel kompenso, la multigon de la malpezaj libroj per kiuj ni povos fariĝi Esperantistoj. Oni devas lerni Esperanton antaŭ ol legi sciencajn librojn Esperantajn.

Al la demando pri la celo de lingvo internacia, mi klarigu ke la plej grava celo estas internacia kompreno pere de tiu lingvo. Tio fariĝus el la eblo interparoli per ĉiutaga lingvo. Tion neniu lernus per sciencaj libroj.

Geo. E. Wagner, Usono.

Enda

De kiam la Akademio oficialigis la sufikson *-enda* oni rimarkas certan konfuzon en la uzo de *-enda* kaj *-inda*. Ekz. en la raporto pri Koreo en n-ro 564 (Nov. 1952) de *Esperanto* oni trovas dufoje "legenda" anstataŭ "leginda". En n-ro 578 (Jan. 1954) en la recenzo pri "Antologio de Brazilaj Rakontoj" oni trovas la esprimon "rimarkenda valoro". Evidente oni povas konsideri *inda* la rimarkadon de valoro, sed altrudi rimarkadon per la sufikso *enda* signifas doni troan emfazon al la rimarkado kaj ne al la valoro mem. Aŭ eble la aŭtoro simple volis eviti la futuron de l' pasivo: "rimarkota valoro", kio ĉi tie estus plene korekta?

Krom sence, *-enda* facile ankaŭ konfuziĝas en la elparolo kun *-inda*. Speciale angla-, nederland- kaj portugala-lingvanoj malbone distingas

inter la vokaloj *e* kaj *i*. Ĉu *-enda* vere estas necesa? Kvankam la antaŭe uzata *-ota* ne estis cent-procente preciza, ĝi plene taŭgis. Cetere oni ankaŭ facile povas ĉirkaŭskribi la ideon, uzante esprimojn kiel "devas esti pagata", "oni devas pagi", aŭ "oni pagu". Eble estus rekomendinde, surbaze de la novaj spertoj, reekzameni la oficialigon de tiu *Ido*-ismo. Certaj *Ido*-ismoj, kiel *mis-* bone enradikiĝis en la lingvo.

Ernesto Sonnenfeld, Argentino.

Nia opinio, la kuntekstoj montras, ke uzo de la sufikso estis pravigebla en la cititaj okazoj.—RED.

La Internacieco de Esperanto

Mi opinias ke D-ro Lapenna estas tro severa en siaj diroj pri *permesi*. Laŭ Plena Vortaro (kaj, mi kredas, kutima uzado internacia) oni povas korekte diri, ekz. "Permesu al mi..." Do, certe oni povas diri "Permesu min..." Plena Vortaro citas frazojn de Zamenhof mem, kiuj subtenas tiun principon.

Ankaŭ pri *oficisto*, mi opinias ke ni povas tute bone uzi la terminon eĉ kiam ne temas pri salajrata ofico, des pli ĉar salajro estas ofte afero de cirkonstancoj. Ekzemple, la estraranoj de la Brita Esperantista Asocio ne rajtas ricevi ian pagon, sed se la Asocio estus ordinara akcia kompanio ili rajtus al pago por sia servo. Tamen en ambaŭ okazoj tiaj postenoj estus *oficoj*, ĉu ne?

D-ro Lapenna certe *permesos min* mencii, ke li dufoje uzas en sia artikolo (kiun mi kore bonvenigas) la vorton *serioza* kie, laŭ mia opinio, la ĝusta vorto estus *grava*. La punkto estas des pli notinda ĉar tiu vorto estas unu el tiuj ne malofte misuzataj de samideanoj.

Bernard Long, Anglujo.

St. V. Stojnić :

PULA




Foto : Orel

Pula : La amfiteatro

CE la bordo de la blua Adriatika Maro sur la plej suda parto de la duoninsulo Istrio troviĝas la bela kaj interesa urbo Pula, la plej granda industria kaj kultura centro de la provinco Istrio en Jugoslavio. Ĝi havas 30,000 loĝantojn.

Malnovaj preĝejoj, antikvaj kaj modernaj konstruaĵoj, belaj parkoj, razenoj kaj aliaj vidaĵoj alternas en ĝi kaj prezentas al turistoj agrablan restadon. Favoraj klimataj cirkonstancoj kaj la ĉarma Istria pejzaĝo altiris jam en la tempo de la Romia Imperio grandan nombron da eminentuloj.

En la mezepoko pro interbataloj de feŭdaj urbaj estroj venis ĝia rapida malgrandiĝo kaj dum la tempo de la Venecia Respubliko pro la ekspluatega industria politiko de Venecio kaj pro


la malario kaj pesto okazis plena ekstermo de la loĝantaro.

Nur en la tempo de Aŭstrujo pro la konstruado de granda arsenalo kaj milita haveno evoluiĝis Pula de sensignifa vilaĝo ĝis sana, granda kaj tute moderna urbo.

Post la definitiva liberiĝo (16an de Novembro, 1943) dum jugoslavia popolliberiga movado, ĉi tiu duone ruinigita kaj prirabita urbo dum mallonga tempo estis taŭge renovigita dank' al la klopodoj de la laboristaro kaj popolaj amasoj.

Inter multaj aliaj vidaĵoj la ĉefa estas la impona monumento el la romia imperiestra epoko la *Areno* (Amfiteatro), kiu estis konstruita de la unua duono de la unua ĝis la dua duono de la dua jarcento de nia erao.

fino sur paĝo 190



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo, horoj de la dissendoj estas laŭ la hor sistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 9-VI, 7-VII). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.50–23.10	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2-VI, “Parolataj leteroj” (S-ro Agren el Svedujo); 4-VI, Freŝdataj informaj dokumentoj (prezentado de libro ĵus eldonita de IEF); 9-VI, Novaĵoj el Italujo; 11-VI, Leterkesto kaj bibliografio; 16-VI, Sankta Pio X-a kaj Esperanto; 18-VI, Itala belarta urbo Torino; 23-VI, Siciliaj kanzonoj; 25-VI, Angelo Poliziano; 30-VI, O-Tei, japana legando.

Esperantistoj posedantaj magnetofonan aparaton estas invitataj kunlabori en rubriko “Parolataj leteroj” sendante al Radio Roma fadenbobenon kun enparolita konversacio. Kondiĉoj: enhavo en perfekta Esperanto; registrado teknike bonkvalita; temoj plej variaj je internacia intereso (escepte politikaj argumentoj); daŭro de la prezentado 18-minutoj. Komisiono senapelacie decidis, ĉu la parolata letero estas inda je radio-disendado. La kunlaboro estas senpaga.

Radio Graz. Vidu anoncon sur paĝo 171.

ĈU EN LA NUNA MONATO VI SKRIBIS AL RADIOSTACIO?

La Planetario

Speciala Astra Teatro

CERTE nur malmultaj legantoj vidis ĝis nun la aparaton, kies bildo aperas sur la kovrilo, kiu similas mergilon aŭ submaran monstron. Sed ĉi tiu estas nek mergilo nek submara monstro, sed planetario, speciala aparato de astra teatro, aŭ pli bone dirite speciala filmteatra aparato—sed sen filmo. La mekanismo estas movita per sep motoroj kaj la homoj sentas sin sub astra ĉielo en la naturo.

La eltrovinto estas prof. d-ro Inĝ. Bauersfeld, kiu antaŭ kelkaj semajnoj festis sian 75-an naskiĝtagon.

Unue, ion pri la astronomiaj okazaĵoj gravaj por la konstruo de la aparato.

Cl. Ptolemeo (ĉirkaŭ 150 jaroj post Kr.) imagis teron kiel centron de la universo. Nikolao Koperniko (1473–1543) ĝustigis post 1400-jara daŭro tiun-ĉi opinion kaj instruis, ke la centro de la universo estas la suno. Pruvante tion, Johano Kepler (1571–1630) trovis siajn tri famajn regulojn, kiujn Isaac Newton (1643–1727) motivis per la naturleĝo pri la gravito.

La kopio de la kopernika sistemo per la mekanismo de la Zeiss-planetario postulas la klarigon de veraj movadoj en la sunsistemo. La centra astro, la suno, staras meze de ambaŭ fokuso de la elipsaj vojoj, sur kiuj movadas la planedoj en diversaj interspacoj laŭviĉe: Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Uranuso, Neptuno kaj Pluto. Tio estas la unua keplera regulo. Ĉi tiuj elipsaj vojoj estas preskaŭ cirkloj kaj ili estas nur malmulte deklinitaj unu al alia. La movadoj mem analogas al la dua keplera regulo, kiu asertas, ke la

radiuso de suno al planedo moviĝas dum samaj tempoj super samaj areoj. Pro tio la rapideco de la astroj ne estas konstanta.

Laŭ la interspaco inter la planedoj kaj suno sekvas la diferenco de la tempoj por unu rondmovado, kion diras la tria keplera regulo: la tria potenco de meza interspaco inter du planedoj kaj suno proporcias al la dua potenco de iliaj tempoj por unu rondmovado. Laŭ tiu-ĉi regulo, ekzemple, kalkulu matematikemuloj la interspacon inter la suno kaj Jupitero! Interspaco inter suno kaj tero=150 milionoj da km, rondmovado de la tero—unu jaro, rondmovado de Jupitero—11,86 jaroj. (Solve: 778 milionoj km.)

La tero rotacias ĉiutage unufoje je sia akso, kiu estas deklinita de la ekliptiko je $66\frac{1}{2}^{\circ}$ kaj kiu faras turbmovadon dum intertempo de 26000 jaroj, nomata precesio.

La tri ĉefaj movadoj de la tero estas jenaj: (a) La taga movado de la tero je sia akso. Tio kaŭzas la laŭŝajnan movadon de la astra ĉielo ek de oriento okcidenten. (b) La jara movado de la tero ĉirkaŭ la suno. Tiu-ĉi movado montriĝis per la rondiro de la suno sur la ekliptiko tra la 12 bildoj de la zodiako ekde okcidento orienten. La kliniĝo de la terakso al la ekliptiko kaŭzas la ŝanĝon de la sezonoj. La kaŭzoj de la laŭŝajnaj movadoj de la planedoj estas la diversaj tempoj bezonataj por rondmovado de la tero kaj la planedoj. (c) La precesio (t.e. la turbmovado de la terakso) de la tero kaŭzas la forigon de la printempa ekvinoktejo laŭ la ekliptiko. Dum

tiu-ĉi movado rotacias la teraj polusoj ĉirkaŭ la polusoj de la ekliptiko kaj tio daŭras 26000 jarojn. Tiu-ĉi movado kaŭzas ankaŭ, ke dum kelkaj jarmiloj montriĝas novaj astrobildoj kaj malaperas kelkaj ĝis nun viditaj. Antaŭ 2000 jaroj la suno staris je la komenco de la printempo en astrobildo de la virŝafo, sed nun ĝi staras je la sama tempo en la astrobildo de la fiŝoj. Do, oni diferencu inter simbolo kaj astrobildo de la ekliptiko !

Planetario plenumas la taskon ekmontro ĉi-tiun moviĝantan astran ĉielon sur duongloba kupolo laŭnature kune kun ĉiuj astroj vidataj per niaj "nearmitaj" okuloj, ekmontro ĉiujn astronomiajn okazaĵojn de unu tago aŭ unu jaro, eĉ de la centoj kaj miloj da jaroj ; ne nur observi dum la plej rapida tempo, sed ankaŭ ekmontro kiel ili montriĝas sur la astra ĉielo super ĉiu latitudo.

Ankaŭ "la vojaĝo de norda al suda poluso" daŭras en planetario nur kelkajn minutojn. Dumvojaĝe oni povas laŭdezire ĉesigi la astrajn movadojn por ke la rigardantoj observu la dumnoktan arktan sunon kaj aliajn maloftajn vidaĵojn sur la ĉielo. Por ekzakta studado oni povas ekmontro la dumtagajn astrajn movadojn anstataŭ dum 24 horoj dum 3, 4, 6 aŭ 12 minutoj ; kiel ankoraŭ speciale estas montrata la jara pasado dum la samaj temperaturigmezuroj, krome ankoraŭ dum 11-sekunda movado. La 26000 jardaŭra movado de la precesio de la fiksastra ĉielo daŭras en la Zeiss-planetario 4 minutojn !

Prof. Bauersfeld solvis tiun-ĉi taskon per konstruo de duongloba kupolo kiel ekrano por la bildoj de la astroj, kiujn projekcias sur la kupolon aparato, t.e. mekanika modelo de la universo, kiun vi vidas sur la bildo,

staranta en la mezo de la mallumigita ejo. Kaj la tutan konstruaĵon, t.e. la superkupoligita domo, kaj la jam nomita aparato de la interesa astra teatro oni nomas "planetario".

En kelkaj urboj de la mondo troviĝas Zeiss-planetarioj. Eble vizitonto de la 39-a Esperanto-Kongreso vizitos la planetarion en Den Haag.

Vi vidos propraokule, kiamaniere oni venkas la "malrapidecon" de la astroj. La observo de la astraj movadoj en planetario dum unu horo pliriĉigas niajn astronomiajn konojn pli multe ol kelkjaraj observoj en la naturo. Tio estas la granda scienca valoro de la planetario. Ĉio estas ĉi-tie videbla, ĉio kion la homa okulo dum favoraj cirkonstancoj sur la astra ĉielo sen helpilo vidas, la fiksitaj astroj ĝis la magnitudo 6,5 (t.e. ĉirkaŭ 9000), ĉiuj famaj astrobildoj, kies nomo estas projekciita sur la artefarita ĉielo, la laktovojo, la astraj nebuloj k.t.p. Kaj ĉion oni vidas dum ĉiu taga kaj nokta tempo, sendepende de la vetero, kiu en la naturo tre ofte malhelpas bonajn observojn. Oni vidas la sunon dum ĝia laŭŝajna taga movado de oriento okcidenten, la ŝanĝiĝintan lunon, la planedojn k.t.p. Oni vidas la sunan kaj lunan eklipson, meteoritojn, kometojn k.t.p.

Per nova speciala aranĝo oni eĉ ekmontas la kopernikan sunsistemon, kiel vidus ĝin observanto, kiu troviĝas 2, 4 miliardoj da km, super la ebena de la tero. Por vera kaj pli bona instruado servas la meridiano projekciita sur la ĉielon, la ĉiela gradreto kun ekvatoro kaj ekliptiko.

Por ebligi al la leganto viziton de planetario dum vizito de urbo, en kiu troviĝas kaj ankoraŭ funkcias pri-skribita aparato (dum la lasta milito

kelkaj estis detruitaj) estu tiuj-ĉi urboj nomitaj: Jena, München, Hamburg, Roma, Milano, Bruxelles, Den Haag, Paris, Osaka, Moskvo, Chicago, Philadelphia, Los Angeles, New York, Pittsburgh kaj Chapel Hill. La plej nova Zeiss-planetario estos konstruata plej baldaŭ en la urbo São Paulo.

Je la fino de ĉi-tiu raporto certe la leganto ankaŭ interesiĝas pri la fabrikejo, en kiu oni konstruas ĉi tiun mirakloplenan aparaton.

Ĝin fondis Carl Zeiss antaŭ 100 jaroj. Baldaŭ li trovis en Ernst Abbe noblan homon kaj sciencan kunlaboranton. Abbe famiĝis ne nur pro la ekzakteco per kiu li plibonigis la optikan teknikon, sed ankaŭ pro siaj socialaj reformoj, kiujn li efikis per la "Carl-Zeiss-Donaco", kiuj ankoraŭ hodiaŭ estas modelaj, spite ĉiujn sociajn progresojn. Post la ŝtatecigo per la orientgermana registaro en la jaro 1948 la firmao Carl-Zeiss-Jena estis novfondita en la okcidenta Germanujo kun la sidejo en Heidenheim. La plejmulto de la antaŭe en Jena okupitaj scienculoj kaj fakaj laboristoj kuniĝis en uzinoj en la Germana Federacia Respubliko. Ĉi-tie ili daŭrigas la gloran tradicion per siaj bonegaj spertoj kaj konoj. La famo de la Zeiss-uzino baziĝas sur la precizeco de la instrumentoj kaj iloj konstruitaj en ĉi tiu uzino. Oni konstruas diversspecajn mikroskopojn kaj projekciilojn. La medicinaj iloj de Zeiss helpas denove al niaj kuracistoj ĉe diagnozo kaj kuracado de malsanoj. La kirurgo denove povas operacii sub la malmulte ombrigantaj Zeiss-lampoj, sub la lumkonuso de la fama modelo, la Pantofos-Lampo. Ombro preskaŭ ne estiĝas. Fama branĉo de la Zeiss-produktaĵoj estas la produktaĵoj de

okulvitroj kaj lupeoj. Oni nun produktas okulvitrojn, kie ne estas videbla limo inter la miopa kaj malmiopa parto de la okulvitro.

Krom ĉiuj medicinaj optikaj iloj oni ĉi tie produktas ankaŭ ĉiujn fotoinstrumentojn, triangulajn ilojn k.t.p. Per kia ekzakteco kaj konscienco la scienculoj ĉe Zeiss laboras, oni ekvidu el sekvanta ekzemplo: Kvar sciencaj kunlaborantoj laboris dum 3 jaroj por eltrovi novan objektivon kaj dum tiu tempo ili kalkulis formulojn, el kiuj unu formulo ampleksas en sia definitiva formo tridek paĝojn skribitajn per skribmaŝino.

Ĉefe en la astronomio estas fondita la mondfameco de la Zeiss-uzinoj. La produktaĵprogramo de la uzino enhavas ĉiujn ilojn de la lernejteleskopo ĝis la specialaj konstruaĵoj, kies diametro estas kelkaj centoj da milimetroj.

Memkompreneble en ĉi tiu uzino la lensoproduktaĵo estas la plej grava branĉo. Oni produktas ĉi tie lensojn por specialaj instrumentoj, ekz. lenson, kiu ne estas pli granda ol la kapo de pinglo. Unu lenso de ĉi tiu malgrandeco kostas 30 DM (Germanajn Markojn). 7000 tiaj lensoj pezas unu kg. kaj havas valoron de 210000 DM. Do, unu kg. de Zeiss-vitro estas treege pli multekosta ol unu kg. da oro.

En ĉi tiu uzino devas kunlabori laboristoj kaj intelektuloj. Por la eduko kaj perfektigo de la junaj laboristoj zorgas—krom ŝtataj instancoj—ankaŭ la uzino mem per fakkursoj.

Per sia kono ili pliigas la famon de la uzino, sed ili per tio ankaŭ helpas regajni la estimon por germanaj produktaĵoj kaj por Germanujo mem.

Josef Steppan.

La Unua Verkisto de Malgranda Popolo

ONI povas havi diversajn opiniojn pri la vivo en la Sovetunio, sed oni devas ekvidi, ke tie estas de jardekoj—apud aliaj revoluciaj agadoj kaj grandaj ŝanĝoj, laŭ diversaj opinioj aprobindaj aŭ ne—granda kulturevolucio. Tio devas interesi unuavice nin, ĉar apud la celado, ke diversaj nacioj kaj popoloj facile komprenu unu la alian, estas ankaŭ la sincera deziro, ke oni lasu libere evolui la popolan vivon, la nacian kulturon de ĉiu ajn popolo, ke ekfloru ties internaj valoroj kaj alportu novajn branĉojn al la komuna kulturo de la homaro. Tia agado estas en Sovetunio: oni ebligas la vivon, floradon kaj evoluon de la kulturo, de la literaturo de ĉiu ajn popolo kaj popoloeto vivanta sur ĝia grandega teritorio.

Se oni aŭdas ie la frazon: “La unua verkisto de malgranda popolo”, oni pensas en la unua momento, ke la verkisto vivis antaŭ multaj jarcentoj, kiel unua verkisto de sia popolo. Sed tiu pri kiu mi skribas, Ritheu, ne vivis antaŭ jarcentoj. Li vivas ankoraŭ nun. Li estas nur 24-jara. Lia patrujo estas Ĉukotka, situante norde de la norda polusa cirklo, en la plej nordorienta angulo de Azio. La nomo de la popoloeto estas “Ĉukĉo”. Oni opiniis pli frue, ke ili apartenas al la eskimoj. Komence de la jarcento la rusa statistiko nombris ilin nur je 6000. Oni vidis ilin jam formorti, kiel tiom da popoloetoj, vivantaj en mizero kaj forlasiteco. Ili ne povis eĉ legi kaj skribi. En Ĉukotka estis nur unu lernejo tiutempe, kaj tiu nur por la infanoj de la rusaj ŝtatoficistoj.

Karakteriza estas pri tio la vivo de la juna verkisto mem; li naskiĝis la 8an de marto 1930 en Uelen. Lia

patro estas membro de balen- kaj foko-ĉasista kooperativo. La knabeto vizitis la tiean lernejon de sia 8-a jaro kaj somere li partoprenis en la pionirtendaroj. Li baldaŭ konatiĝis kun la verkoj de rusaj kaj aliaj sovetaj verkistoj. Post la ĝenerala lernejo li partoprenis en la laboro de la ĉasista kooperativo. Poste li fariĝis interpretisto kaj gvidanto ĉe geologia ekspedicio. Li ankaŭ eklaboris ĉe la redakto de ĉukotka ĵurnalo kaj poste veturis al Leningrad, kie li studas en la universitata fakultato de la nordaj popoloj.

Liaj noveloj, kiujn li skribis en ĉukĉa lingvo, kaj kiuj jam aperis krom rusa traduko parte ankaŭ franclingve en la revuo *Les Lettres Françaises* temas ĉiuj pri la nuna Ĉukotka. Li priskribas la malnovajn kutimojn de sia popolo kaj kiel venkas tiujn la novaj kutimoj. En sia rakonto nomata *Fenestro* li priskribas ekzemple, kiel protestas kontraŭ ofendo de la praa sanktaj kutimoj la maljuna Gemalkot, kiam liaj du filoj volas fari fenestron en lia tendo. Sed la instruisto saĝe klarigas la aferon, kaj la avantaĝoj de la vitrofenestro konvinkas la maljunulon. Sed ni ekscias ankaŭ, ke la nova tekniko tiel rapide trovis vojon en tiu forlasita popolo, ke dum kelkaj ankoraŭ indigniĝas pro forigo de ia praa popolkutimo, por ili jam estas natura afero, ke vojaĝante al aliaj lokoj ili uzu la vagonaron, vaporŝipon, eĉ la flugmaŝinon.

“Multaj atendis de mi”, diris li foje, “ke mi skribos pri sorĉistoj. Sed kredis al mi, la sola sorĉisto kiun mi vidis en mia vivo, mortis, dum mi estis knabeto. Iam oni faris grandajn

fino sur paĝo 190

La Tombejo de la Nekatolikoj en Romo

CI tiu historia kaj karakteriza tombejo, celo de ĉiutagaj pilgrimadoj italaj kaj eksterlandaj, estis ordinare nomata “protestanta” aŭ “de la angloj kaj de la germanoj”; sed pli bone ĝi estas difinita de la multenombraj romaj kulturasocioj “tombejo de la artistoj kaj de la poetoj”, pro la multaj artistoj, poetoj, pensuloj kaj eminentuloj eksterlandaj kaj italaj, kiuj estis enterigitaj de post la jaro 1722; tio estas de kiam Jakobo Stuart ricevis unuafoje la permeson enterigi interne de la urbaj muregoj nekatolikan familianon.

Enirinte tra la ĉefa kradpordo, sur kiu estas skribita la signifoplena vorto “Resurrecturis” (t.e. “al la reviviĝontoj”), oni ŝajne tute ne troviĝas en tombejo. Ĉio estas gaja, ridetanta, trankvila; la merloj, la paseroj kaj aliaj birdetoj saltetas neĝenataj de unu arbo al alia, aŭ pepas apogitaj sur la kradoj limigantaj la tombojn. La tomboj kuŝas sur milda deklivo inter la antikva Aŭreliana murego kaj pli moderna

krenelita muro. Vico da cipresoj donas al la loko aspekton ne malgajan, sed severan kaj serenan. Kaporoj, hedero, glicineoj rampe kreskas ĉirkaŭ la trunkoj de la arboj kaj sur la muroj; de tio rezultas pitoreska fono, kelkfoje kvazaŭ teatra scenejo. Oni duonvidas, inter la arboj, la majestan konstruaĵon de la piramido al Caius Cestius, ĉirkaŭ kiu flugas krietante la hirundoj. Ĝi ŝajnas stari, kiel fortikaĵo protektanta ĉi tiun tomboĝardenon, kiu, meze de la bruego de la moderna urbo, estas kvazaŭ angulo de revolando, pacoazo por tiuj fremduloj, kiuj, pasie amante la eternan urbon, deziris resti en ĝi eĉ post sia morto.

En la plej antikva parto de la tombejo, apud la piramido, ripozas la juna angla poeto John Keats, kiu, malĝojigita pro la juĝoj de siaj samtempuloj, petis, ke sur lia tombo oni skribu nur “Ĉi tie kuŝas mi, kies nomo estas skribita sur la akvo”. En la ekstazo de la vivofino, la mortanta poeto diris la jenajn ĉarmajn vortojn: “Mi sentas la lekantojn kreski super mi”; kaj tiuj estis



La tomboj de John Keats kaj Joseph Severn

efektive profetaj vortoj, ĉar post kelkaj semajnoj lia amiko, pentristo Severn, trovis sur lia tombo la lekantojn belkreske florantajn en la gloro de la roma printempo. La delikataj poemoj de tiu pasia kantinto de la naturaj belaĵoj, kaj la romaneca melankolia leteraro kun sia inspirinto Fanny Browne, igis lin inda de la poemo "Adono", verkita okaze de lia morto, de la granda amiko Percy Bysshe Shelley. Dekstre ripozas pentristo Joseph Severn, kiu, vivinte pli longe, havis la ĝojon vidi Keats konsiderata inter la grandaj anglaj poetoj. Nur plurajn jarojn poste estis metita medaliono sur la apudan muron, kun kortuŝa, delikata surskribaĵo, en kiu la unuaj literoj de ĉiu verso formas la nomon Keats.

Inter la multaj aliaj tomboj en la antikva parto de la tombejo troviĝas unu kun modesta ŝtono memoriganta William Shelley, la trijaran fileton de la granda poeto, mortintan en la jaro 1819. Apude troviĝas pluraj aliaj ŝtonoj memore al la fama pentristo Karl Fohr, al Ackerblad studemulo pri Egiptujo, al arkikekturisto William Mead, fondinto de la Amerika Akademio kaj ĝia prezidanto dum 25 jaroj, al pentristo Jacob Moore, k.t.p. Ĉi tiu antikva parto estas nun rezervita nur al la eminentuloj eksterlandaj en Romo, speciale bonmeritaj al la urbo, al la artoj kaj al la sciencoj. De ĉi tie oni povas bone admiri la masivan piramidon de Septemvir Caius Cestius; dumvive li ne havis specialajn meritojn, sed prizorgante la oficialajn kaj religiajn ceremoniojn li kapablis amasigi tiom da mono, ke li povis pretendi de la heredontoj, ke dum tricent tagoj ili konstruigu al li tian maŭzoleon en egipta stilo, kiu memorigos lin tra la jarcentoj. Apud



La tombo de Shelley

tiu impona konstruaĵo ironie kontrastas la monumento al Sidney Bowles, konsistanta el tre malgranda piramido.

En la ombro de la 201a turo de la Aŭrelia murego ripozas la cindroj de la granda angla poeto Percy Bysshe Shelley. Lia tragika vivofino estas konata: translokiĝinte en aprilo 1822 al urbeto Lerici, li vivis nur inter siaj libroj kaj la maro kun sia amiko Williams. Tie li konstruigis al si boaton, kaj dum la tuta printempo li spitis ventojn kaj uraganojn. Je la komenco de julio li enboatigis kun la nedisigebla Williams por viziti en Livorno la senespere malsanan amikon Leigh Hunt. La 22an de julio dum terura vetero ili forlasis Livornon; la tago estis malbelega: la uragano furiozanta ĉe la noktiĝo renversis ilin. La kadavro de Shelley estis retrovita kelkajn tagojn poste sur la plaĝo de

Viareggio. La amikoj Byron kaj Trelawney decidis pretigi funebran ceremonion laŭ la antikva kutimo al tiu granda amanto de la greka mondo: fronte al la maro oni starigis brulŝtiparon kaj oni metis sur ĝin la kadavron de Shelley; la korpo de la granda poeto estis tute forbruligita, kiam Byron ekvidis meze de la flamoj la koron sendifekta. Eniginte la manon inter la karbojn, li povis ĝin preni. Nun ĝi troviĝas en Boscombe (Anglujo), dum la cindroj kuŝas en Romo, en ĉi tiu tombejo, pri kiu li mem unu jaron antaŭe estis skribinta: "Ĝi estas la plej solena, la plej bela tombejo ekzistanta. Vidante la sunon brili sur la freŝa herbo, vidante la rozojn en aŭtuno, aŭskultante la murmuron de la vento inter la folioj kovrantaj la tombon de Cestius, rigardante tiujn tombojn, kie ripozas precipe virinoj kaj infanoj, oni dezirus morti, por ĝui la dormon, kiun ili ŝajnas ĝui". Sur la modesta ŝtono, sub la delikata difino pri li "Cor cordium" (t.e. "Koro de l' koroj") estas ĉizitaj tri belegaj versoj tiritaj el *La Ventego* de Shakespeare, tiu uragano, al kiu Shelley mem estis dediĉinta mirindajn versojn, sed kiu bedaŭrinde subite detruis lian valoran ekziston.

Maldekstre de la tombo de Shelley troviĝas ŝtono pri lia granda amiko Edward Trelawney, kiu deziris esti memorigata apud li. Tie proksime estas ankaŭ la eleganta marmora steleo* farita de la granda skulptisto Thorwaldsen por la filo de Goethe, kiu mortis antaŭ ol la patro kaj ripozas tie, kie Goethe mem estus dezirinta ripozi por ĉiam. Ĉirkaŭ tiu tombo, en la tiel nomata "germana angulo", estas multenombraj tomboj de germanaj eminentuloj, kiuj lasis en

Romo gloran memoron. Inter ili estas la juna poeto Wilhelm Waiblinger, la verkistino von Maysenburg, la ĵurnalisto kaj poeto Hans Barth, arkeologo Walter Amelung, pentristo Moritz Meurer, la pentristo kaj mecenato Strohl-Fern. Kaj ne malproksime la tombo de Henriko Coleman, la forta roma pentristo, filo de anglaj gepatroj, ripozanta en la ombro de steleo el travertino.

Tie proksime dormas ankaŭ fraŭlino Hertz, ĉarma kaj riĉa ŝatantino de antikvaĵoj, kiu malavare donacis al la itala ŝtato siajn kolektojn de artaĵoj; kaj Karlote Popert, valora pentristino, kiu, naskiĝinte en Hamburgo, post sia alveno al Romo neniam plu estus volinta forveturi; devigata al tio pro militaj postuloj, ŝi aranĝis siajn aferojn tiel, ke ŝi povu reveni al la Eterna Urbo almenaŭ por sia lasta dormo.

Kiel atesto de la delikataj sentoj inspiritaj de ĉi tiu karakteriza tombejo al multaj fremdaj verkistoj, jen kelkaj pensoj de ili skribitaj:

Von Platen tiel esprimas sian deziron: "la ĉielo konsentu al mi pace kuŝi en ĉi tiu tero, malproksime de mia frosta naskiĝlando, kie ĉiu plej arda sopiro glaciĝas sur la lipoj".

Kaj Shelley: "Tiaj belaĵoj povas dezirigi la morton, pensante, ke oni povas esti enterigata en tiel dolĉa loko".


Kaj jen la pensoj de Benedict: "Kampo de Dio, dediĉita al la fremduloj, kiu verŝajne estas la plej rava, kiun oni povas trovi sur la tero".

Kaj de Carter: "Sankta ĝardeno, kie ne fremduloj sed Romanoj estas konsiderataj tiuj, kiuj ripozas sub la cipresoj kaj la pinoj, en la delikata ĉirkaŭbrako de la Eterna Romo.

Luigi Minnaja.

* steleo=staranta memoriga ŝtono

Enigma Konkurso N-ro 89



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj :

N-ro 199 : Ne ĉio griza estas lupoj. nigelo - espero - ĉapelo - infero - oktavo - gazelo - rilati - impeti - zibelo - anĉovo - estimi - serafo - tabelo - angilo - sekura - latiro - urtiko - petalo - ordoni.

N-ro 200 : Kia patrino, tia filino. Kia greno, tia pano. Ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon. Samkvaliteco.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 85-a konkurso : S-ro C. Graversen (Dan) 133, S-ro Chr. F. W. Slijper (Ned) 126, S-ro T. Raimar (Norv) 126 p.

Enigmo N-ro 203 : Krucvort-enigmo. Figuro : kvadrato (15×15) sen nigraj fakoj. *Horizontale* : 1. malpuriga loko (R) ; rifuzi obeon (R), cifero (R). 2. pagi por ricevi gazeton, agi same kiel iu alia, profite uzeble. 3. intesta doloro (R), paperfolieto (R), arto esprimi pensojn per gestoj (R). 4. ununure, tre facile vaporigante, plej bona parto. 5. planto kreskanta sur ŝtonegoj (R), parto de vorto (R), oficiale konsenti meritojn (R). 6. preĝejeto (R), rebonigi (R), aristokrato (R). 7. malbongusta, apartigi, estiĝi. 8. subita teruro (R), cefalopodo kun brakoj ĉirkaŭ la kapo (R), montri sian opinion per voĉdono (R). 9. planto sur sabla grundo, parto de teksto, rabofiŝo. 10. malmultvorta (R), denove diri (R), malfortiga retorika figuro (R). 11. memkompreneble (R), levaparato (R), bonkondukta

(R). 12. afable inkline, monavide, fordoni multvaloraĵon. 13. kruela regnestro (R), larĝa apogseĝo (R), bombasta oratoro (R). 14. dekreto, malkorektaĵo, malhumile postuli. 15. denove signi iun por iu servo (R), ĉasbesto (R), poezio kantanta personajn impresojn (R). Ĉiu linio do havas tri vortojn.

Vertikale : 1. H-1a, H-6a, H-11a ; 2. H-2a, H-7a, H-12a ; 3. H-3a, H-8a, H-13a ; 4. H-4a, H-9a, H-14a ; 5. H-5a, H-10a, H-15a ; 6. H-1b, H-6b, H-11b ; 7. H-2b, H-7b, H-12b ; 8. H-3b, H-8b, H-13b ; 9. H-4b, H-9b, H-14b ; 10. H-5b, H-10b, H-15b ; 11. H-1c, H-6c, H-11c ; 12. H-2c, H-7c, H-12c ; 13. H-3c, H-8c, H-13c ; 14. H-4c, H-9c, H-14c ; 15. H-5c, H-10c, H-15c. Do ekzemple V12=profite uzeble, estiĝi, fordoni multvaloraĵon.

Enigmo N-ro 204 : Misteroj en-senditaj de S-ro T. K. Slade (Brit.)

1. Serĉu kvar selsliterajn vortojn, kies kvara litero estas respektive A, E, I, U, dum la ceteraj literoj restas senŝanĝaj.
2. Kial (laŭ la Pl.V.) Japana laboristo kontraŭstaras la klasbatalan politikon.
3. Serĉu vorton kies unua difino en la P.V. estas : Daŭre . . . adi, kaj la dua estas : Maldaŭre . . . i. La punktoj reprezentas la saman radikon ambaŭfoje.

fino sur paĝo 192

E. Motillon :

La Fundamentoj de Asekuro

ASEKURO estas nun nedisigebla parto de la socia vivo. Kaj neniu pensas ke ĝi estas apenaŭ ducentjara. Kio do ĝi estas ?

La *Plena Vortaro* liveras tiun difinon de la vorto "asekuri" : "Fari kontrakton por kompensi per mono okazeblajn riskojn".

Tiu longega difino perfekte klarigas la celon de asekuro, monkompensi eblajn damaĝojn aŭ perdojn, kies efektiviĝo estas antaŭvidebla.

Por la asekuristo, asekuri estas pli ĝuste : "Preni sur sin aron da riskoj kaj ilin monkompensi konforme je la leĝoj de statistiko".

En tiuj du difinoj, estas uzata la teknika termino "risiko". Kion signifas tiu vorto por la asekuristo ? Ĝi estas ebla okazo ĝenerale malprofita por la asekurato. Ekzemple incendio, hajlo, eĉ morto. Sed kiam temas pri asekuroj garantiantaj renton aŭ doton, la priasekurata okazontaĵo ne estas damaĝo aŭ malprofito, sed ĝi estas *necerta*. Oni do povas diri, ke la ĉefa karakterizo de risiko estas ĝia necerteco. Eble, vi pagas vian tutan vivon asekuron kontraŭ incendio, kaj neniam suferas incendion ; vi povas subskribi polison por ricevi renton kiam vi estos 50-jara, kaj morti unu jaron antaŭe.

La asekuristo, prenante sur sin la monkompenson de iu kategorio de riskoj, devas kalkuli la necesan proporcion inter la sumo, kiun li postulas de la asekurato, kaj la sumo kiun li devos pagi, ĉiufoje kiam unu el tiuj riskoj efektiviĝos.

Tian kalkulon li povas fari nur dank' al statistiko kaj al ties leĝoj. La ĉefaj el tiuj leĝoj, kiu estas la

fundamento de statistiko, kaj sekve de asekuro, estas nomata "leĝo de la grandaj nombroj". Ĝi estas tiele esprimebla : "La observata ofteco de iu okazaĵo ju pli fariĝas proksima al ĝia probableco, des pli oftaj estas la eksperimentoj".

Por klarigi tiun leĝon, jen ekzemplo. Se mi ĵetas supren moneron, kiam ĝi falas teren la probableco por ke la figurflanko estu supre varias inter 0 kaj 1. Se mi ĵetos la moneron 100 fojojn, la probableco estos minimume 0.43 kaj maksimume 0.57. Sed, se me ĵetos ĝin 1.500.000 fojojn, la probableco varios nur inter 0.499 kaj 0.501.

Nu, se tiu leĝo de la grandaj nombroj estas la fundamento de asekuro, la monkompenso de la efektiviĝantaj riskoj estas ebla nur dank' al Mutualeco.

La sumoj pagitaj de ĉiuj asekuratoj ebligas kompensi la perdojn suferatajn nur de *kelkaj*, kies risiko efektiviĝis.

La leĝo de la grandaj nombroj ebligas kalkuli la sumon postulatan de ĉiu. Mutualeco ebligas dispartigi inter la tuta anaro la kompenson de la perdoj kaj damaĝoj suferataj de kelkaj anoj.

Krom tiujn du leĝojn, asekuro obeas ankoraŭ aliajn, kies ĉefa estas "homogeneco de la riskoj".

Mutuala riskaro povas ekzisti nur se la riskoj estas samspecaj, ĉar evidente, la leĝo de la grandaj nombroj estas valora nur por kompareblaj elementoj, alivorte homogenaj. En ĉiu kategorio de riskoj, la ofteco de la efektiviĝo de la riskoj ne estos la sama, estas do necese adapti la tarifojn al la specoj

de riskoj. Eĉ por simplaj objektoj, la riskoj povas esti malsamaj, pro ilia konsisto, uzo aŭ situacio. Domo el ligno estas pli facile bruligebla ol fercementa konstruaĵo. El du domoj same konstruitaj, unu situanta apud fabriko estos pli danĝera risko ol la alia, izole situanta.

Tiu leĝo de homogeneco naskas alian konsekvencon: la diferenco inter la propraj valoroj de la riskoj ne devos esti tro grandaj, ĉar unu sola perdo povus engluti la tutan enspezaron de unu jaro.

Por eviti tro grandajn diferencojn inter la valoroj de la riskoj, ekzistas du rimedoj: kunasekuro kaj reasekuro.

Kunasekuro konsistas el la asekuo inter kelkaj asekuristoj, ĉiu el kiuj akceptas respondecon nur por unu parto de la risko. Por grandaj magazenoj, gravaj firmaoj, ofte okazas, ke unu sola risko estas garantiata per 80 aŭ 100 diversaj asekuristoj.

Kunasekuro estas do la unua rimedo por la diserigo de la riskoj. Reasekuro ankaŭ celas tiun diserigon, sed laŭ tute alia principo. Per ĝi, asekuristo asekuras ĉe alia asekuristo parton de la riskoj kiujn li akceptis. Ĉiuj asekuraj societoj kaj kompanioj reasekuras parton de siaj riskoj, kaj reciproke akceptas reasekurojn de la aliaj societoj. Ekzistas eĉ societoj por reasekuroj. La asekurato neniel rilatas kun la reasekuro, kiu estas nur “interna afero” por la asekuranto.

Kiam okazas gravegaj incendio, ŝipdrono aŭ aviadila falo ie ajn sur la terglobo, ĝiaj financaj sekvoj estas sentataj en ĉiuj grandaj urboj de la tero, kaj la kompenso de la damaĝoj okazas pere de ĉiulandaj asekuristoj.

Per asekuo, multaj ruinoj kaj suferoj estas forigitaj, dank’ al la mutuala kunhelpo de asekurantoj

kaj asekuratoj ĉiulandaj. Por ni, Esperantistoj, ĝi estas pia pruvo de la nepre solidareco de la homoj. Tiu internacia unuiĝo sur unu speciala financa fako, pruvas la eblecon de unuiĝo sur la aliaj kampoj de homa aktiveco kaj pravigas, unu fojon pli, la verecon kaj necesecon de nia movado.

La Sorĉisto : *fino*

ridegas kun li ! Pasas la dua minuto. La infanoj ekdancas : Hop, hop ! Ĉiuj dancas en rondo ĉirkaŭ la sorĉisto. Sed . . . iel strange ! ? Jes, mekanike, kiel pupoj ! Pasas la tria minuto . . . en malproksimo ektondras minace . . .

* * *

La rondo ankoraŭ dancas, nur mi restas ekster. La sorĉisto ŝajnas al mi nun—kvazaŭ travidebla, iel malplena. Ĉu eble pro krepusko ? Ja ĉiuj fariĝis diafanaj . . . ! Kio okazis . . . ?

“Ĉio nulo, ĉio”, susuras la foliaro. Ĉio nulo ? Kie mi estas . . . ? Kial mi ne iris hejmen . . . ? Ĉio malaperis . . . , sole la tableto staras sur razeno. Ĉu efektive ? Mi alpaŝas por tuŝi ĝin ; ĝi ja estas la sama, kiun ni antaŭ jaroj uzadis—por ludi marionetan teatron . . . , ni infanoj. Marionetoj ! Nun mi komprenas ĉion : Joĉjo kaj Marinjo estis la ĉiamaj aktoroj. Mi volas min apogi . . . , sed la tableto — disfalas. “Ĉio nulo . . . ; ĉio”, susuras la vespera vento. Dum minuto mi ankoraŭ aŭskultas la misteran parolon, poste mi malrapide turniĝas al la aleo . . .

Jen ! La sciureto. Kiel groteske ĝi saltetas. Ĉu la sama, kiun mi jam renkontis . . . ? Melankolie mi vekiĝas el la sonĝo pri mia infanaĝo ; krom la rememoroj—ĉio nulo ! Jes, ĉio . . .

Nova metodo por Fruktkulturado


FRANCA fruktkulturisto, Thomas Bouché, ellaboris novan metodon por fruktkulturado, kiu vekis grandan intereson ĉie kie ĝi estas konata. La principo estas doni al la novplantitaj arboj impulson limigi la evoluon de trunko kaj branĉoj, kaj samtempe stimuli al pli riĉa produktado de fruktoj. Ĉar tio povos esti akirata laŭ simpla laborŝpara maniero, la metodo de Thomas Bouché estas bonega vojo al pli ekonomia fruktkulturado. Precipe ĉar la arboj tiamaniere donas abunde da fruktoj jam la duan kaj trian jaron.

Kiam oni ĝenerale plantas frukt-arbojn en la ĝardeno, la ĝardenisto jam dum 3 jaroj flegis la arbon, tranĉante la branĉojn por formi la branĉaron kaj kreskigi fortikan trunkon kaj branĉojn kiuj povas porti la grandan branĉaron de la plenkreska arbo. Tiamaniere la arbo estos 10-jara antaŭ ol ĝi donos sufiĉe grandan rikolton. Estas konate ke nur la oblikvaj branĉoj donas fruktojn, kaj Thomas Bouché tial ekhavis la ideon ke oni povus havi pli grandan rikolton se oni stimulus la arbojn produkti oblikvajn branĉojn anstataŭ evolui fortikan trunkon. Kaj li trovis genian solvon: mallonge dirite la metodo estas planti la arbojn en

vicoj, kiuj iom post iom formiĝas en heĝon per interplektado de la branĉoj.

Sed unue oni preparu la teron per fosado je du fosilprofundaĵoj (proks. 50 cm.) laŭlonge kaj laŭlarĝe de la estonta heĝo. La tertavoloj devas ne tro miksiĝi pro la bonfarto de la termikroboj. Poste oni plantas unujarajn inokulitajn plantojn, sed *ne vertikale*, kiel kutime, sed *en 30° angulo kun la surfaco*. La plantoj devas esti plantataj tiom profunde ke *la inokulpunkto estos manlarĝe sub la tero*. Tio estas tre grava, ĉar tiam ankaŭ la inokulita valora branĉo mem faros radikojn. La plantojn oni metas je interspaco de 150 cm. kaj parope unu klinita kontraŭ la alia, tiel ke ili kruciĝas. En la kruciĝo oni povos eventuale provizore ligi la branĉojn. La branĉoj nepre ne devas esti tranĉataj, tio estas grava por ke la planto jam venontan jaron povu doni fruktojn. Inter la vicoj povas esti 1.5 ĝis 2 metroj, aŭ 3 metroj se oni deziras interkulturon de ekz. fragoj aŭ malaltkreskaj legomoj. La heĝoj fariĝas proks. 1.5m. altaj, tiel ke ili ne donos multe da ombro.

Ĉar la planto staras oblikve en la tero, la plej suba branĉo kreskas pli rapide ol la aliaj. Kiam ĝi akiris certan longecon en vertikala direkto,



Skizo de la heĝo

oni fleksas ĝin je angulo de 30° kun la tero, sed en la kontraŭa direkto de la patrinplanto, kaj ĝi kruciĝas kun la koncerna branĉo de la najbara planto kaj provizore ligiĝas al ĝi. Tiamaniere oni daŭrigas per ĉiuj aliaj branĉoj kiam ili sufiĉe kreskis, farante kvazaŭ plektaĵon el la branĉoj por ke la plantoj apogu sin unu al la alia, kaj tiamaniere formante firman skeleton ili portas la ŝarĝon unu de la alia.

La flegado de la heĝo estas tre simpla, ĉar ĉefe ĝi mem prizorgas tion. Estas ankaŭ menciinde ke la fruktheĝoj ne suferis de malsanoj kiuj donis grandan perdon al aliaj francaj fruktkulturistoj.

Estas tre praktike kaj tempoŝpare ke oni povos rikolti ĉiujn fruktojn starante sur la tero, kaj tre malmulte da fruktoj falassurteren kaj difektiĝas. Ankaŭ estas avantaĝo ke gemaljunuloj kaj infanoj povas rikolti, kaj oni povas tuj apartigi kaj enkestigi la rikolton.

Kiel jam menciite, la plantoj jam la duan jaron donas fruktojn, kaj poste tiom multe kiom oni ne povis akiri per alia metodo. (Bouché rikoltas tri- ĝis kvin-oble la kvanton de aliaj sur samgranda tereno). Oni tial povus opinii ke la produktado estas tiom intensiva ke la arbo post mallonga tempo laciĝos kaj la kvanto malkreskos. Kelkaj fruktspecoj vere montras malkreskon de la kvanto post 25 jaroj, sed tio tamen ne estas problemo, ĉar Bouché tiam tranĉas la heĝon ĝis 10 cm. super la tero kaj formas la nove elkreskantajn branĉojn sammaniere, kaj post du-tri jaroj ili denove akiras maksimuman rikolton.

Thomas Bouché elprovis ĉiujn detalojn de tiu ĉi metodo antaŭ ol li publikigis ĝin en 1949, post 30 jaroj de sperto. En multaj landoj oni nun provas lian metodon, ankaŭ en

Norvegujo, kie fruktheĝo plantita en majo 1952 jam en junio 1953 donis 20–30 florojn sur ĉiu planto. Tio estas iom tro multe por tiom junaj plantoj, kaj oni deprenis la duonon, sed venontjare estos abundeco da fruktoj sur la 3-jaraj arboj—je kiu aĝo la fruktarboj ĝenerale nur estas plantataj.

Ĉiaj fruktspecoj povas tiamaniere kreski, sed precipe pomoj kaj piroj. La arboj estas tiamaniere bone ŝirmitaj kontraŭ vento, kaj oni povas facile kovri la plantojn kontraŭ la frosto. Per tiamaniera kulturado oni povas kreskigi fruktarbojn en lokoj kie troa vento aŭ troa frosto malebligis tion. Kaj en malgrandaj ĝardenoj oni tiamaniere povas kulturi multajn specojn da fruktoj kaj tamen havi sunon ankaŭ por aliaj vegetaĵoj.

Gudrun Johnson.

(Kompilita el artikoloj de René Heitz en Helse for Alle).

Esperantoplaco en Gotenburgo. La urba konsilantaro de Gotenburgo, la dua urbo de Svedujo, decidis doni la nomon “Esperantoplaco” al baldaŭ novarangota placo en la mezo de la urbo. Tiamaniere Svedujo la unuan fojon ricevis Esperantoplacon, dank’ al energia laboro de la gotenburgaj gesamideanoj.

Niaj Mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, kaj deziras al iliaj parencoj esprimi nian plej koran kondolencon.

Loewenberg, D-ro Richard D., Delegito de UEA en Bakersfield, Calif., Usono, mortis je la 29a de aprilo 1954, je aĝo 55.

Steiner, S-ino Maria Anna, edzino de Kortega Konsilisto Hugo Steiner, Vieno, mortis la 9an de aprilo 1954, 70-jaraĝa. Fidela vivkunulino de nia nelacigebla samideano Steiner, ŝi multe lin subtenis en lia laborado por nia afero.

Renkontoj : *fino*


Kaj nun mi pensas, ke por ni estas feliĉo, ke ankaŭ nun ekzistas ankoraŭ kvietaj maljunuletoj, kiuj havas la tempon por bari la vojon al aliaj. Ĉar ili reportas iom da homaneco en niajn malhomanecajn rilatojn.

Estas feliĉo, ke ekzistas ankoraŭ infanoj kaj afablaj kamparaninoj, kiuj survoje retenas nin per siaj rakontoj, kaj tute ne atentigas niajn gravajn okupojn. Ili memorigas nin pri tio, ke ekzistas ankoraŭ alia vivotenigo ol la antaŭenkurbita rapidpaŝa irado de la rapidanta homo. Kaj kiam post tia prokrasto ni foriras de ili kun amuziĝa rideto pro la renkonto, kiu por unu momento donis iom da gajeco kaj afableco sur nia vojo, tiam ni eble pripensos ke verdire ni hontu, ĉar ni preterpasas ilin tiom ofte, kaj en nia rapido forpuŝas ilin. *Trad. Betsy Leopold.*

Seminario por Cseh-metodaj Instruistoj en Haarlem (29a-31a julio 1954).

La seminario okazos sub rektoreco de S-ro J. van der Meulen, direktoro de la Regna Instruista Seminario en Haarlem. Gvidanto, S-ro Andreo Cseh. La lecionoj okazos dum ĉiuj tri tagoj, matene kaj posttagmeze. Vesperoj estos liberaj. Detalojn ĉe Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Nacia Libro-Ligo Brita (*National Book League*). Je la 28a de aprilo S-ro K. R. C. Sturmer prelegis anglalingve al tiu organizaĵo pri la temo "Lastatempaj Tendencoj en la Literaturo Esperanta". Per trafaj aludoj al la angla literaturo, li lerte prezentis al ne-Esperantistoj la verkojn de pluraj el niaj nuntempaj aŭtoroj.



Per flugiloj de facila vento

Internacia Konkurso 1954**Stato je la 30a de Aprilo**

	Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando ..	2000	2675	133.8
2. Kanado ..	250	280	112.0
3. Nederlando ..	4600	4985	108.4
4. Urugvajo ..	250	270	108.0
5. Svislando ..	1500	1600	106.6
6. Germanujo ..	3600	3785	105.1
7. Sudafriko ..	300	305	101.7
8. Svedujo ..	5900	5880	99.7
9. Maroko ..	700	695	99.3
10. Japanujo ..	900	850	94.4
11. Hispanujo ..	1600	1485	92.8
12. Portugalujo ..	500	455	91.0
13. Jugoslavujo ..	1600	1441	90.0
14. Francujo ..	5600	4969	88.7
15. Aŭstrujo ..	850	745	87.6
16. Islando ..	350	295	84.3
17. Britujo ..	9500	7993	84.1
18. Italujo ..	2900	2435	83.9
19. Aŭstralio ..	1000	820	82.0
20. Usono ..	2300	1807	78.5
21. Kubo ..	250	190	76.0
22. Izraelo ..	250	170	68.0
23. Belgujo ..	2300	1504	65.4
24. Norvegujo ..	2300	1455	63.3
25. Danlando ..	2500	1575	63.0
26. Argentino ..	950	570	60.0
27. Novzelando ..	850	485	57.0
28. Venezuelo ..	250	140	56.0
29. Irlando ..	250	120	48.0
30. Brazilo ..	6400	2150	33.6

Pula : fino

Ĝi estas unu el la plej bone konservitaj arenoj, kaj ĝi povis akcepti 25.000 rigardantojn.

Ĉijare okazos en Pula Opera Festivalo de la 3a ĝis la 25a de Julio. Krom operaj prezentadoj estas antaŭviditaj koncertoj, filma festivalo, regato kaj boksmaĉoj.

Ĉiuj prezentadoj okazos en la areno, kie antaŭ multaj jarcentoj okazadis kruelaj luktoj de gladiatoroj kaj sangaj bataloj kun sovaĝaj bestoj.

La Esperantista Societo "La Adriatika Stelo" dum la Festivalo aranĝos en sia imponaejo Esperantistan ekspozicion. Ĉiulandaj gesamideanoj estas petataj sendi al ĝi (Poŝtfako 54) kiom eble plej multe da ekspoziciaĵoj kaj korespondaĵoj.

Eli Urbanová :*Vana sopiro*

*De l'bordo sonas violono . . .
Ondoj boaton balancas . . .
La luno kiel lampiono
super la maro dancas . . .*

*Vual' krepuska delikata
noktajn fantomojn vivigas . . .
Al fantazio nebridata
la melodi' instigas . . .*

*Mi dolĉe revas pri najado ;
ĝi elmergiĝos el ondoj
kaj de l'elasta moviĝado
ŝaŭme briletos rondoj . . .*

*Jen—io kirlas akvon mole !
Vanas vi, mia sopiro !
Turniĝas tamen mi scivole
kun retenita spiro.*

La Unua Verkisto : fino

festojn, se oni sukcesis kapti balenon. Sed nun tio ne estas ebla. Lastfoje, kiam mi estis hejme, dum du monatoj la kooperativo kaptis 5 balenojn. Se oni farus tiel ofte grandajn festenojn, ne estus tempo por la laboro". Li rakontis, ke kiam li unue laboris ĉe ruslingva ĵurnalo, kiel tradukisto, oni diris, ke ne estas eble verki literaturon en la ĉukĉa lingvo. Por pruvi la malon li komencis skribi unue poemojn, poste rakontojn. Ili aperis unue en ĉukĉaj gazetoj, poste ankaŭ en Leningradaj kaj Moskvaj revuoj. Nun li jam estas vaste konata. Liaj verkoj estas interesaj, bonstilaj, sed li devas ankoraŭ evolui kaj li diligente studas ĉe la Universitato. Nun li laboras sur sia unua romano.

Paŭlo Balkányi, Budapest.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 261

5-an de Majo 1954

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aprilo 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj	3733	4625
Individuaj membroj		
MJ 634		788
MA 3279		3514
MS 503		646
Patronoj .. 6		7
DM 259		271
HM 58		56
	4739	5282
	8472	9907

NOVA KOMITATANO

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, Via XX Settembre 15, Como, Italujo.

DELEGITOJ

Argentino

Bahia Blanca. D : R. Otermin, Casilla de Correo 235.

VD : F-ino M. Llorens, Fitz Roy 554. Tel : 1126.

Buenos Aires. VD : R. G. Calógero, Guleguaychu 1081 (Suc. 7).

FD (Grafologio) : J. Milkuschutz, Cap. Ramon Freyre 3678.

FD (Presado) : A. M. Corral, A. Magariños Cervantes 2650. Tel : 59-6339.

FD (Terkulturo) : vakas.

Necochea. FD (Farmacio) : J. A. Diez, Humberto Primo 56. Tel : 483.

Aŭstralio

Sydney. VD : F-ino Edna Dash, 26 Edgeware Road, Enmore.

Danlando

Aarhus. FD (Sporto) : vakas.

Engesvang. D : E. Mertner, Nygade 6.

FD (Fervojoj) : La D.

København. FD (Farmacio) : V. Rude, Frederiksberg alle 18, København V. Tel : Eva 6733.

Finnlando

Uurainen. D : vakas.

Francujo

Anzin-St.-Aubin (P. de C.). D : Achille Dumarquez, Anzin-St-Aubin, par Arras.

Charenton. D : vakas.

Chatel-Guyon (Puy-de-Dôme). D: C. Martin. Villa Espero.

Clermont-Ferrand. FD (Abelbredado) : G. Vidal, 58 avenue des Landais.

FD (Aviado) : J. Brelurut, Les Clos, Route de Riom, Montferrand.

FD (Fotografio) : R. Ponty, 43 Rue Georges-Clemenceau. Tel : 65.97.

Germanujo

Essen. D : D-ro L. Wegener, Hollestr. 1. FD (Katolikismo) : P. H. Klein, Demrathkamp 28. Tel : 74231.

Solingen. FD (Komerco) : G. Langenberg, Kotterstr. 10 I lks. Tel. 271-57.

Zülpich. D : J. Koch, Kölnstr. 20.

Jugoslavujo

Zagreb. FD (Ftizologio) : D-ro J. Janjić, Buliceva 3. Tel : 38-833.

Kubo

Santiago de Cuba. D : R. Guerra Ibarra, Masó 518.

Nederlando

Bussum. D : A. N. Bus, Piet Heinlaan 13. Tel : K 2959-6817.

Nieuw-Scheemda. D : K. H. Sportel, Nieuw-Scheemda—Post : 't Waar, (Gron.)

's Hertogenbosch. D : A. C. Hoedelmans, Eerste Korenstraat 16.

Nova Kaledonio

Pagoumène. D : vakas.

Sarlando

Peranto : Günter Feis, Hauptstr. 70, Altenwald. Pêk : Saarbrücken 22887.

Svedujo

Ekshärad. D : N. R. Anderwall, Lb 1110. Tel : Basterud 37.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

623. Dancausse, F-ino I., Mayregne, Francujo

624. Rokkan, S-ro G., Narvik, Norvegujo

625. Haugen, S-ro E. A., Trondheim, Norvegujo

626. Symoens, S-ro E., Leopoldstad, Kongo Belga
 627. Cerato, D-ro J., Jujuy, Argentino
 628. Bourguignon, S-ro A., Lannemezan, Francujo
 629. Dusauso, S-ro J., Paris, Francujo
 630. Hoyle, S-ro J., Manchester, Anglujo
 631. Jeffrey, S-ro G. H., Bournemouth, Anglujo
 632. Robinson, Kapt. K. E., Croydon, Anglujo
 633. Ullrich, S-ro W., Wien, Aŭstrujo
 634. Solzbacher, D-ro W., Yonkers, N.Y., Usono
 635. Keramsi, F-ino L., Meknès, Maroko
 636. Richardson, S-ro D. B., Tacoma, Wash., Usono
 637. Harvey, S-ro J., Glasgow, Skotlando
 638. Costanzo, S-ro R. Di, Ksar-es-Souk, Maroko
 639. Larrad, F-ino M. E., Manchester, Anglujo
 640. Nace, S-ro P. E., Milan, Mich., Usono
 641. Ehrlich, S-ro B., Sydney, Aŭstralio
 642. Laid, S-ro L., Lurnea, N.S.W., Aŭstralio
 643. Link, S-ro K., Heidelberg, Germanujo
 644. Bailey, S-ro E., Ashford, Mddx., Anglujo
 645. Scott, S-ro R., Letchworth, Anglujo
 646. Harrington, S-ro R. J., Greenford, Anglujo
 647. Gayfer, S-ro W. T., Cleethorpes, Anglujo
 648. Baker, S-ro C. A., Exeter, Anglujo
 649. Jacobson, S-ro J., Nordmaling, Svedujo
 650. Larsson, S-ro C., Sala, Svedujo
 651. Tell, S-ro L., Stockholm, Svedujo
 652. Schauenberg, S-ro E., Genève, Svislando
 653. Mila, S-ro E., Drancy, Francujo
 654. Pollard, S-ino H., Perth, W. Aŭstralio.
 655. Fernández Alvarez, S-ro J., Oviedo, Hispanujo
 656. Ison, F-ino H. M., Ardleigh, Anglujo
 657. Jones, F-ino P. O., Kansas City, Mo., Usono
 658. Garreau, S-ro M., Paris, Francujo
 659. Andersson, S-ro A., Alingsås, Svedujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : J. S. Kitching 20ŝ., F-ino H. Bray 5ŝ., F-ino D. Dawe 2ŝ. 6p., A. D. Hovhannissian 3ŝ., J. C. Hall 5ŝ., E. C. Hilder 9ŝ., L. G. Preedy 20ŝ., K. Davis 2ŝ., J. F. Jackson 2ŝ. 6p., C. A. Baker 15ŝ., E. Mila 10ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : W. Brandenburg 8ŝ., E. Kind 8ŝ., Ges-roj R. Kogel 33ŝ., O. Sandrock 20ŝ., E. L. Schuster 25ŝ., Sozialwerk der Deutschen

Bundesbahn Hannover 42ŝ., J. Derieuw 14ŝ., D. J. Langman 20ŝ., L. Santamarina 9ŝ. 6p., D-ro Makkink 14ŝ., Esp. Unuiĝo "Kompreno", Berlin-Charlottenburg 50ŝ., Esp. grupo Bingen 16ŝ. 6p., L. G. Preedy 40ŝ., F-ino P. Sinclair 10ŝ., S-ino Dronier 14ŝ., R. Harry £2, Sveda Esp. Fed. kaj Svedaj Esperantistoj £279 5ŝ. 8p., H. E. Reed 24ŝ., F-ino M. Larrad 15ŝ., Southport Esp. Soc. 30ŝ., S-ino M. I. Gardner 2ŝ. 6p., R. Sparks 19ŝ. 6p., E. Tison 20ŝ., Marseille-grupo 27ŝ., S-ro Guerrier 20ŝ., H. Bourdelon 8ŝ. 3p., A. Legret 9ŝ., G. Feis 20ŝ., M. Lesoin 10ŝ., E. E. Yelland 20ŝ., C. Gicquel 10ŝ., Limoges-grupo 20ŝ., M. Moindrot 4ŝ., R. Lecoq 10ŝ., P. Marly 20ŝ., R. Llech-Walter 10ŝ., S-ro Pottier 10ŝ., St. Etienne-grupo 20ŝ., M. Crochet 10ŝ., D. Luez 20ŝ., C. Brunet 20ŝ., A. Odier 20ŝ., J. Vincent 20ŝ., S-ro Laprebende 20ŝ., Parizaj fervojistoj £12, C. le Seach 5ŝ., S-ro Martin 2ŝ., A. Ploussu 20ŝ., Altenwald-grupo 20ŝ., Thiers-grupo 20ŝ., Comentry-grupo 10ŝ., S-ino Mouneyron 20ŝ., S-ino F. Feraire 20ŝ., Internacia Esperanto-Instituto £10, A. Cseh 20ŝ., F-ino Roquefort 10ŝ., Alès-grupo 30ŝ., M. Sujet 10ŝ., St.-Etienne-grupo 42ŝ., Abbé Coudray 16ŝ., M. Petit 10ŝ., Prof. E. Barana 57ŝ., Parma-grupo 54ŝ. 8p., Prof. E. Sordelli 6ŝ., Firenze-grupo 23ŝ., C. Grazzini 11ŝ., Itala Esp.-Instituto 11ŝ., G. Perrini 11ŝ., E. Filipi 6ŝ., Torino-grupo 84ŝ., D-ro A. Fusco 57ŝ., C. D. Esposti 11ŝ., L. Pitacco 3ŝ. 6p., Padova-grupo 11ŝ., C. Cadario 3ŝ. 6p., E. Neiger 5ŝ. 6p., F-ino L. Karamsi 5ŝ., B. Graf 8ŝ., P. Humberst 16ŝ., Ned. Unuiĝo por Esp. en sciencoj £9 2ŝ.

Sumo ĝis 30.4.1954 : £836 15ŝ. 2p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Enigma konkurso : *fino*

4. Serĉu vorton, kies dua difino en la P.V. estas : alte . . . i, kaj, serĉante la difinon de la vorto prezentita per la punktoj, vi trovos : alte . . . i en kiu la punktoj reprezentas la serĉatan vorton.
5. Serĉu ĝentilan esprimon de bondeziroj, kiu memorigas pri suferanto pro konstanta jukado.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Sed ni ĉiuj, per nevualita vizaĝo spegulante la gloron de la Sinjoro, transformiĝas en la saman bildon, de gloro al gloro, kiel el la Sinjoro la Spirito. *11 Kor. 3. 18.*

Bildetojn pri Nia Sinjorino, kiajn oni konservas en preĝlibro, kolektas kaj interŝanĝas S-ino Em. Chantrain, Deuzeldstr. 83, SCHOTEN, Antwerpen, Belgujo.

BP. Garaĝo Nérée-Lesage (apud preĝejo de Sta. Huberto) Terhulpen-steenweg 225, BOSVOORDE-Brussel, Belgujo. Tel: 489263. Rabato por Esperantistoj.

Internacia Kultura Semajno, 16–23 Julio 1954, en franca Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkuponon S-ro G. Odent, Lycée Chanzy, CHARLEVILLE (Ardenne), Francujo. Karavano al Haarlem aranĝota fine de la monato. Represo petata.

Eŭropa Turista Servo, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-Brussel, Belgujo. Subtenu, petante turismajn informojn pri Eŭropaj vidindaĵoj. (1 resp. kup.)

Gelernantoj, 15–17-jaraj, serĉaskorespondantojn en tutmondo. Esperanto-Rondo, Ooyodo-Kootoo-gakko, Miyazaki-shi, Japanujo.

S-ro Ivan Krestanov en SOFIA, str. 6 Septembri 2, Bulgarujo, petas kontraŭpage aŭ interŝanĝe numerojn de *Esperanto* de UEA, *Lingvo Internacia*, *Oficiala Gazeto Esp.*, *Heroldo de Esperanto*, k.a., gazetojn enhavantaj liajn kunlaboraĵojn, la franc-lingvajn broŝurojn pri L.I. de Rektoro Boirac kaj General Sebert, la doktortezon de Pierre Corret, *Plenan Esp. Gramatikon* de Kalocsay, *For la batalilojn* de Berta v. Sutner, la numerojn 13–21 de “Internacia Mondliteraturo” kaj la Esp. antologiojn esceptante la Bulg., Belgan, Hungaran, Svedan kaj Svisan. Refinverkas sian cignan kanton “Tra Eŭropo per Esperanto”, ilustritaj vojaĝnotoj kaj impresoj de lia 50-jara Esp. vivado.

S-ro N. Gamble, 27 Froggatt Str., Turner, CANBERRA, Aŭstralio, vizitos Eŭropon 1955 kun edzino kaj 2 geknaboj 8–10. Tuto deziras korespondi per leteroj, pm., pk., k.t.p.

Salvador Diez, Apartado 882, VALENCIA, Hispanujo, deziras korespondadon kun fervojistoj el ĉiuj landoj kaj interesiĝas pri memorigaj medaloj, gravuraĵoj, ilustritaj afiŝoj, biletoj, kongresaj kaj datrevenaj markoj pri fervojoj, tramoj kaj subteraj vagonaroj.

Membroj de “Societo de Junaj Esploristoj” petas interŝanĝon de libroj, gazetoj, artikoloj k.s. pri ekspedicioj ĉiuspecaj, en ĉiuj lingvoj, laŭ interkonsento. Skribu esperante, hispane, portugale, france, angle aŭ itale al S-ro Victor Núñez Regueiro, Roca 1754, ROSARIO, Argentino.

Deziras korespondi kun samidean(in)oj el Hispanujo, Portugalujo, Afriko, Sud-Ameriko: Ouwehand-Lernejo, Hogewal 2, DEN HAAG, Nederlando.

Instruistino 20-jara deziras korespondi kun Eŭropo kaj Afriko. F-ino Emma Pasetti, Piani di CAMPOROSSO (Imperia), Italujo.

Helpu propagandi nian lingvon en oficialaj medioj sendante gratul-leterojn, aŭ prefere, ilustritajn kartojn, okaze de omaĝfestoj okazonta 27an Julio, honore al unua Esperanto-instruanto en nia urbo, katolika pastro de la Piaĵ Lernejoj. Adresu al la peranto: V. Hernández Llusera (por Pastro Marko Llirò), Str. Avda. Ej Español 59, SABADELL, Hispanujo. Represo petata. Korespondaĵo alveninta postdate ankaŭ efikos.

Em. Swedenborg, sveda sciencisto kaj klarvidulo, rivelas en siaj religiaj verkoj la *novan lumon* pri la koncepto de Dio kaj postmorta vivo. Lia filozofio akordigas la religion kun la scienco kaj baziĝas je la spirita senco de S. Biblio. La traktatojn vi ricevos senpage, se eble, kontraŭ 1 resp. kup. ĉe: Jan B. Vlach, Lužická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakujo.

Por Kongresvizitontoj: 2 Esp. insignoj kun naciaj koloroj germ. DM 3.– aŭ 10 resp. kup. maldekstre stampitaj. Alsendo en letero. Haveblaj por: Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Irlando, Monako, Nederlando, Polujo, Rumanujo, Vatikano, Abesinio, Argentino, Bolivio, Ekvadoro, Gvatemalo, Venezuelo. Mendu ĉe: Hans Gruber, POCKING-HAID (13b), Germanujo.

10 div. Esperanto-insignoj germ. DM 8.50 ;
7 diversaj malgrandaj DM 4.90 ; 5 pecoj
pordoŝildetoj el aluminio kun verda stelo
kaj surskribo "Esperanto parolata" DM 3.0.
Alpendaĵoj por kolĉenoj 3 div. kun insigno
DM 3.70. Alsendo per letero. Resp. kup.
maldekstre stampitaj estas akceptataj 10
resp. kup.=DM 3.-. Revendistoj ĉie
serĉataj. Mendu ĉe Hans Gruber, POCKING-
HAID (13b), Germanujo.

D-ro L. L. Zamenhof, Kreinto de Esperanto—15-XII-1859—14-IV-1917. Bela portreto de nia Majstro ; dukolora preso : bildo nigra 12.5 × 7.5 sur blanka fono 21 × 15 kun verda surskribo. Po 60 it. liroj (8 anglaj pencoj) plus afranko. 5 ekzempleroj 6 respondkuponoj afrankite. Grupo Esperantista Catanese, Via Ughetti 24, CATANIA, Italujo.

Londona Esperanto-Klubo aranĝas ekspozicion je la fino de Aŭgusto. Bonvolu sendi taŭgan materialon (bildkartojn, turismajn foliojn, gazetojn, k.t.p.) al S-ro W. G. Atkinson, 227 Queens Road, LONDON, S.W.19, Anglujo.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj. Poŝtmarkojn algluu bildflanke. Ĉiam respondos. S-ro Dmitro Savkevich, Wing Hostel, LEIGHTON BUZZARD, Beds., Anglujo.

Antaŭ Haarlem

SKOTLANDO VOKAS VIN !

INTERNACIA FERIA SEMAJNO

Julio 24a ĝis 30a, 1954

en

**Newbattle Abbey Kolegio,
proksime al Edinburgh**

Modernaj komfortoj - Bonaj manĝaĵoj
Allogaj ekskursoj kaj aliaj distraĵoj
Modera kosto - Nur 60 lokoj

Skribu tuj por detaloj al :

**La Sekretario,
Edinburgh Esperanto Society,
20 Glendevon Road, Edinburgh 12,
Skotlando**

LA ALASKA STAFETO

kaj

KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

Originale verkitaj de F. Omelka

Du tre interesaj kaj streĉaj rakontoj, kiuj unue aperis en "Esperanto" en 1949 kaj 1951.

Ili nun aperas en libroformo, kun aldonitaj fotoj, skizo pri la aŭtoro kaj plano de Alasko.

Formato 22 × 14.5 cm. 96 paĝoj

Tole bindita kun bilda polvŝirmilo

Prezo 6 ŝilingoj, afranko 4p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe vialanda libroservo aŭ ĉe

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**